REGO

☆ RUSIA ESPERANTO-GAZETO ☆

movada revuo *№ 6 (103) decembro 2017*

en la numero

120-jariĝo de Tatjana Kulakova

Lingvotrejnado kaj Zamenhof-festo en Jekaterinburg

Raja Kudrjavceva – Esperantisto de la jaro 2017

versaĵoj kaj tradukoj de M. Giŝpling, M. Bronŝtejn, L. Novikova, K. Ilutoviĉ, K.Balmont

"Griza kapreto" – parodioj de T. Auderskaja

fotoj el diversaj jaroj

Moskvo, 2017

enhavo

01 La festa decembra E-kunveno en Jekaterinburgo (R. Kudrjavceva)

03 120-jariĝo al Tatjana Kuzjminiĉna Kulakova (I. Gonĉarova)

05 Pri la tria Lingvotrejnado en Jekaterinburgo (R. Kudrjavceva)

06 Impresoj de la partoprenintoj

09 Nekrologo pri Valerij Jeroĥin (J. Zajdman)

10 Stelo, falinta el la ĉielo (L. Novikova)

11 Reprezentanto de UEA alparolis la plenan sesion de la 39-a Ĝenerala Konferenco de Unesko

12 Bulteno de REU (materialoj el la novembra kaj decembra numeroj)

20 Belartaj Konkursoj de UEA en 2018

21 "Vi dum la vivo zorgu pri l' animo..." (L. Novikova)

22 Versaĵoj de M. Giŝpling en tradukoj de L. Novikova

37 El Esperanto en la rusan (M. Bronŝtejn)

42 "En forgesita lok' en sino de Rusio..." (L. Novikova)

44 Poemoj de K. Balmont en tradukoj de L. Novikova

48 Novelo de S. Pisaĥov (antaŭparolo kaj traduko de L. Ŝapoŝnikova)

50 L' edzin' de l' francambasador' (kanto kun interesa historio)

54 Versaĵoj de K. Ilutoviĉ

61 "Griza kapreto" – serio de parodioj (T. Auderskaja)

64, k3, k4 Fotoj el diversaj jaroj

k4 Amuzaj misskriboj kaj eraroj

k4 "Estimataj gesamideanoj" (G. Kokolija)



la 23-an de decembro 2017 sekve de stratakcidento en Jalto forpasis Jefim Semjonoviĉ Zajdman (1937-2017)

REGo

(Rusia Esperanto-Gazeto)

№ 6 (103) decembro 2017

aperadis ekde 2000

redaktis **Georgij Kokolija**
kunredaktis **Viktor Aroloviĉ**
kunlaboris **Maksim Griŝin**

poŝta adreso: Pjatnickoje ŝosse 45 – 105
125310 Moskvo, Rusio
retadreso: gazeto@mail.ru

ATENTON: ekde la jaro 2018 REGo ne plu aperados.

LA FESTA DECEMBRA E-KUNVENO EN JEKATERINBURGO

La 16-an de decembro, sabate, en Jekaterinburgo sukcese pasis la tradicia Zamenhof-festo. Ĝenerale dum la tempoperiodo 2007–2017 entute okazis jam 11 Zamenhof–festoj en la urala ĉefurbo! Ili ĉiuj estis interesaj kaj variaj. Ankaŭ la ĉi-jara ĝojigis ĉiujn 29 partoprenintojn per la riĉa kaj alloga programo.

La unua programero estis rakonto de Aleksandr Osincev pri Esperanto-aktivaĵoj de esperantistoj en la tuta mondo, okazigitaj dum la Zamenhofa jaro diversloke kaj diverslande. La ĉeestintoj povis vidi rapoton pri la programo de Zamenhof-jaro en Unesko, spekti videon de la alparolo de la reprezentanto de UEA Stefano Keller dum la Forumo pri Minoritatoj, ankaŭ pri aktivaĵoj de esperantistoj en Litovio, Francio, Ĉinio, Kubo, Pakistano, Venezuelo, Turkio, Italio, en Vieno kaj en Sankt-Peterburgo. Krome ni spektis videon pri la aprila renkontiĝo de samideanoj en Varsovio ĉi-jare, ĉe la Zamenhofa tombo.

Post tio okazis la programero "Kiujn Esperanto-librojn ni legis lastatempe?", dum kiu jekaterinburgaj partoprenintoj de la internacia projekto pri la legado rakontis pri sia partopreno en la lasta Esperanto-sumoo; Raja Kudrjavceva, Lena Uspenskaja, Vera Matvejeva, Irina Kirina volonte montris la librojn, kiujn ili legis dum ĝi, kaj Sergej Kumkov ne nur montris la legitan libron, sed ankaŭ prezentis sian recenzon pri ĝi, kiun li sendis al la projekto. Ankaŭ Aleksandr Osincev prezentis interesan libron "La legisto", kaj Raja Kudrjavceva – la stakon de Esperanto-libroj , aĉetitaj de ŝi somere dum RET-2017.

De la Zamenhof-festo kaj Tago de la libro ni transiris al la alia festo, anoncita en la programo: la 10-jara jubileo de nia junulara klubo "Arĝenta Flamo". Surekrane estis montrita la prezentaĵo pri la klubo, farita de Raja Kudrjavceva; spektante ĝin ni ĉiuj rememoris la tempon, kiam aperis la klubo, kaj multajn apartajn

momentojn el la kluba Esperanto-vivo kaj agado. Nia jekaterinburga esperantistino kaj profesia dezajnisto Lena Ĥusanova faris, presigis kaj donacis al la klubanoj belan plakaton pri "Arĝenta Flamo". Estas tre agrable mencii, ke okaze de la 10-jariĝo ni ricevis multe da gratuloj rete kaj pertelefone de amikoj el diversaj lokoj; skajpe nin gratulis tiuvespere esperantistoj de Krasnojarska Esperanto-klubo; sendis siajn videojn MASI-anoj kaj esperantistoj el Sankt-Peterburgo, kiuj dum la festado de la Zamenhof-tago en la belgia konsulejo ĉiuj kune gratulis jekaterinburganojn kaj aparte la membrojn de "Arĝenta Flamo". El Marsejlo ankaŭ sendis video-gratulon nia klubanino Jana Ĥusanova, kiu nun studas kaj loĝas en Francio. En la nomo de la klubo mi esprimas niajn sincerajn dankojn por tiuj agrablaj gratuloj al ĉiuj sendintaj ilin geamikoj.

Ankaŭ min persone tiutage atendis tre agrabla surprizo. Evidentiĝis, ke post la voĉdonado en la REU-Estraro oni nomumis min Esperantisto de la Jaro 2017, kaj Vladimir Opletajev informis pri tiu novaĵo en nia regiona dissendolisto. Ĉar mi mem estis tro okupita pri la preparado de la festa kunveno kaj ne havis la tempon legi sabate matene la retpoŝton, mi kompreneble tion ne supozis. Tial, kiam Aleksandr Osincev anoncis tiun novaĵon kaj enmanigis al mi la bukedon de belaj orkideoj, tio por mi estis granda neatendita novaĵo, pro kiu mi preskaŭ perdis la parolkapablon.

Kiel pinto de ĉies partopreno estis la komuna koncerto, kiun ornamis kantado de nia gasto – esperantisto el la najbara urbo Revda – Dmitrij Rzjanin kaj belaj bardaj kantoj – tradukaĵoj el Bulat Okuĝava kaj Veronika Dolina, kiujn kantis jekaterinburga esperantisto Sergej Kumkov. Nepre estas menciinda, ke ambaŭ: kaj Dmitrij, kaj Sergej, plenumis po unu kanton, tradukitan memstare, kio laŭ mia opinio tre valoras. Estis ankaŭ deklamado de Esperanto-poemoj: Sergej Lokis kaj mi prezentis kelkajn niajn ŝatatajn Esperanto-poeziaĵojn. Dum la paŭzoj surekrane estis montritaj videoj pri Zamenhof kaj Esperanto-kantado de vaste konataj Esperanto-kantistoj.

Kiel bonega fino de la festa kunveno estis komuna festeno, dum kiu sonis multaj ĝojaj tostoj, okazis vigla babilado kaj regis tre varma kaj amikeca etoso. Ni preskaŭ forgesis pri la planita komuna fotado, sed tamen iu sugestis tion al ni, kvankam kelkaj el la amikoj jam adiaŭis kaj foriris antaŭ tiu momento. Feliĉe tiuj, kiuj ankoraŭ restis, plezure fotiĝis por memoro.

Do, fine venis vico por la sincera dankado al la plej dankindaj homoj, dank' al kiuj la festa kunveno sukcese realiĝis: al Natalja Mansurova kaj ŝia filo Eduard – mastroj de la komforta kunvenejo, kiu atendis nin tre bele kaj feste ornamita; al nia gasto el Tjumeno – Pavel Veselov, kiu perfekte regis la teknikan flankon de la aranĝo, al ĉiuj partoprenintoj, kiuj estis tre ĝoje kaj aktive agorditaj! Dankon, karaj! La impresoj, kiuj restis enanime post la evento, vivos longe!

Raja Kudrjavceva (Jekaterinburgo)

120-JARIĜO AL TATJANA KUZJMINIĈNA KULAKOVA

La 8-an de januaro 2018 estos 120 jaroj ekde la naskiĝo de mia kara amata avinjo Tatjana Kuzjminiĉna Kulakova.

Tatjana Kulakova (fraŭline Toĉilkina) naskiĝis la 8-an de januaro 1898 en la Siberia urbo Omsko, en la familio de sukeraĵisto. Ŝiaj gepatroj nokte bakis bulketojn kun rosinoj, papavo, ĉokolado kaj fruege matene portis ilin al uzina enirejo por vendi al la laboristoj, irantaj al la unua laboralterno.

Ŝi finstudis en gimnazio kaj en 1916 bonŝancis trafi la Bestuĵev-kursojn por fraŭlinoj en Sankt-Peterburgo, kie ŝi entuziasme studis en la historifilologia fako. Intercetere ŝi aŭskultis la prelegojn de I.A. Baudouin de Courtenay, kiu rakontis al la kursaninoj pri Esperanto. La mondfama lingvisto sukcesis flamigi per Esperanto la junan koron de Tatjana por tuta ŝia vivo. La ŝtormaj revoluciaj eventoj de 1918 en Sankt-Peterburgo ruinigis ankaŭ la "burĝan" kursejon, kaj Tatjana Toĉilkina revenis al la naskiĝurbo.

Tamen, samkiel multaj studintinoj de la Bestuĵev-kursoj, ŝi sukcesis iĝi instruistino pri la rusa lingvo kaj literaturo en mezlernejo. Ĉu samtempe, pli frue aŭ poste – ŝi aliĝis al la urba Esperanto-klubo, kun ĝia ardoplena junularo, revanta pri la tutmonda internaciismo.

Inter la klubanoj estis samideano Pjotr Kulakov, milda, delikata intelektulo kun saĝa atentoplena rigardo de la grizaj okuloj, sinĝena antaŭ la afereca kaj je du jaroj pli aĝa Tatjana. Tamen pasis konatiĝperiodo, kaj ŝi eknomis lin Ŝtala, kaj li ŝin – Ĉielarka. En 1920 ili geedziĝis sen viziti preĝejon. La nupta festo ne estis ankaŭ komsomola. Ĝi estis Esperanta, kaj la du gesamideanoj ĵuris pri la reciproka amo sub la verda standardo.

Ili restis fidelaj unu al la alia ĝis la lasta spiro, kaj ĝis la lasta spiro ili restis fidelaj al la idealoj de sia juneco: la lingvo Esperanto, la Interna Ideo, la in-

ternaciismo kaj la tutmonda paco.

En 1923 naskiĝis la filo Viktor, en 1927 – la filino Svetlana, mia amata karmemora panjo. Pjotr Ivanoviĉ oficis kiel sekretario en la urba administrejo, Tatjana Kuzjminiĉna instruis la rusan lingvon kaj literaturon, intercetere dum dek jaroj – en la Kursoj por la milic-komandantaro (nun la Omska akademio de Ministerio de la internaj aferoj de Rusio). Ne restis multa tempo por Esperanto, tamen en la familio la kara lingvo sonis ĉiutage, kaj, plej verŝajne, estis instruata de Tatjana Kuzjminiĉna en sociaj rondetoj. Evidente, la Esperanta aktivado restis en la familio, ja ial en la mornaj 30-aj jaroj de la stalinaj reprezalioj en ilian hejmon trafis stokoj da Esperantaj lernolibroj kaj vortaroj, kiujn la geedzoj enmurigis por kaŝi en sia ligna loĝdomo. En la postmilita periodo kaj la 50-aj jaroj mia avinjo iom post iom restarigis ligojn kun sovetiaj esperantistoj kaj aktive ekkorespondis, en la 60-aj ŝi ekabonis Esperantajn revuojn, ankaŭ eksterlandajn.

En 1960 mortis mia bonkora avo Pjotr Ivanoviĉ Kulakov, kaj la avino transloĝiĝis al Soĉi, kie jam delonge loĝis mia panjo Svetlana Petrovna kaj mi. Kaj en Soĉi Esperanto iĝis la ĉefa okupo de mia avinjo. Ŝi ekinstruis nian lingvon en urbaj kursoj kaj firmigis la funkciadon de la Soĉia Esperanta klubo, multe helpata de sia fervora lernanto Volodja Bespalov. Intercetere, ŝi aktivegis en la Dendroparko, amikiĝis kaj konstante kunlaboris kun Ludmila Dmitrijenko – la estrino de la parka unikaĵo – la Arbo de Amikeco, kie ili kune okazigis Esperantajn eventojn kaj eĉ la greftadon fare de famaj esperantistoj sur la Esperanta Arbo.

Intertempe kreskis mi, kaj mia avinjo formis tutan mian vivon, en mia juneco inkliniginte min al Esperanto. Sed tio estas jam mia historio...

Irina Gonĉarova (Odincovo)

PRI LA TRIA LINGVOTREJNADO EN JEKATERINBURGO

Novembre en Jekaterinburgo la trian fojon okazis lingvotrejnado kun 38 partoprenantoj el 18 rusiaj urboj. Jam eblas diri, ke lingvotrejnadoj iĝis nova paĝo de la Esperanto-movado en Uralo. Simila instrua Esperanto-aranĝo nenie aliloke en Rusio ekzistas, kaj simila formato de Esperanto-instruado postulas enorme grandan laboron de instruistoj-trejnistoj, longan kaj delikatan preparadon kaj okazigon de lecionoj en sufiĉe aktiva ritmo. Estas tre bone, ke denove estis tiuj tri tagoj, kiam ni povis intense praktiki la lingvon! La organiza teamo de la aranĝo klopodis, ke tiu tempo estu plena de senco kaj signifo, utila por ĉiuj, kaj ĝi interese pasu en la ŝatata medio kaj amika etoso.

La instruan programon tre bone reĝisoris Vladimir Opletajev. Li vere tre fervore preparis ĉion, multe kontaktis ĉiujn ceterajn instruistojn, mem gvidis multajn lecionojn en la B-nivelo kune kun Darja Zelenina kaj Roman Jefremov. Kaj Volodja, kaj Daŝa ambaŭ bone kompetentas en linvopedagogio kaj okazigis senriproĉajn lecionojn. Espereble ĉiuj partoprenintoj de la B-nivelo kun granda plezuro praktikis la lingvon kun ili. Aparte allogaj por ĉiuj estis intelektaj kaj lingvaj ludoj de Roman Jefremov. Krom ili en la A-nivelo aktive instruis Tatjana Vŝivceva, Konstantin Ĥlizov kaj Irina Gonĉarova, ĉiu el kiuj ofertis por la programo lecionojn en sia originala maniero de instruado. Mi vizitis la lecionojn de ĉiuj instruistoj en la A- kaj en B-niveloj kaj povas konstati, ke la lernantoj nenie enuis kaj estis tre aktive engaĝitaj en la instruprocedon.

Krom tiuj du instruniveloj, ĉi-foje ni havis apartan grupon por infanoj. Kaj ni tion provis fari por la unua fojo kaj “flugigi supren” kiel provan aerbaloneton. Eble la unuan fojon ĝi leviĝis ne tre alte, tamen tio estis tre bona sperto por ni ĉiuj, kio ŝajnas al mi valora. Opiniante, ke intereson al Esperanto eblas provi formi de infaneco, mi proponis komenci de niaj propraj infanoj. La revo pri infanoj okupis firman lokon en mia koro, kaj mi komencis tiun ideon nerapide evoluigi. La kreitan infanan grupon gvidis dum la lingvotrejnado Jelena Kuznecova el Samara, al ŝi ankaŭ helpis nia miassanino Tatjana Vŝivceva. Klopodante prezenti Esperanton senaltrude, ili en luda kaj distra formo po iom, per homeopatiaj dozoj komencis instrui geknabojn kaj paroligi ilin. Tio ne estas facila tasko, sed mi esperas, ke “bono farita ne estos perdita” kaj se ni daŭrigos tion, eble niaj penoj alportos siajn fruktojn estonte kaj iam poste en Uralo okazos nova suprenflugo de Esperanto.

Krom la lecionoj en la programo okazis aliaj notindaj programeroj: prezentado de la somera instruado en Barlaston (Anglio) fare de Lidija Jerofejeva, kiu trifoje partoprenis tiun aranĝon, rakontoj pri la internaciaj projektoj: Sumoo, Esperanta

Poŝtkruciĝo kaj Amikumu, informa programero pri REU, Ronda tablo pri regiona agado. Ne mankis ankaŭ distraj programeroj: Amika Vespero, komuna kantado, noktaj ludoj. Al la kultura aspekto de la programo sukcese kontribuis la koncerto, kiu okazis en la dua vespero. Dum ĝi la muzikbando de nia esperantisto Konstantin Ĥlizov prezentis kelkajn kantojn en etna stilo kaj unu en Esperanto. Daŭrigis la vesperon programeroj de la partoprenintoj – okazis kantado, deklamado kaj komuna gaja skeĉo. Tio estis bela krono de la programo.

Mi ŝatus esperi, ke la lingvotrejnado, al kiu ni dediĉis multe da niaj fortoj kaj energio, donis al ĉiuj partoprenintoj bezonatan lernoimpulson, kiu daŭris ankaŭ post la aranĝo, kaj ĝi restos en nia memoro dank' al multo bona. Al ni ĉiuj mi deziras sukcese evoluigi niajn lingvokapablojn kaj moviĝi ĉiam antaŭen kaj supren!

Raja Kudrjavceva (Jekaterinburgo)

P. S.: sube vi povas legi kelkajn impresojn pri ĉi tiu aranĝo.

Aleksandr Mitin (Niĵnij Novgorod)

Viziti Jekaterinburgon mi volis delonge: ĝi interesis min, mi multe aŭdis pri la urbo, legis pri ĝi. Sed nur ĉi-jare finfine aperis kaj tempo, restinta de ferioj, kaj kaŭzo por veni, des pli – esperantista kaŭzo. Okazis Lingvotrejnado.

Jekaterinburg mem estas urbo por nepra vizito kaj rigardo. Vera Urala centro. Mi speciale venis pli frue ol komenciĝis la Lingvotrejnado kaj dum la semajno mi promenis en la centro kaj ne nur, esploradis urban "ruĝan linion" de vidindaĵoj kaj publikan transporton – ĝi estas unu el miaj aliaj interesoj. Kaj poste estis preskaŭ tri tagoj por esperantumi.

Kiam oni proponis al mi registriĝi kiel Esperanto-instruisto, mi iom hezitis.

Jes, antaŭnelonge mi faris la kurson en mia urbo, sed dubis, ĉu mia sperteto taŭgas por LT. Kaj krome, mi ne estis certa pri la formato de la lecionoj. Sed, verdire, mi vane dubis, ĉar la ĉefa ideo de la aranĝo estis: diversaj instruistoj kaj formoj de lecionoj: kaj paroligaj kursoj, kaj prilumo de apartaj gramatikaj momentoj, kaj ludoj... Kaj, finfine, ĉion ĉi eblas fari same diverse!

Eĉ du diurnoj por la tuta aranĝo ne taŭgas. Estis vere densa horaro. Ĝuste pro tio mi venis pli frue: por ke estu la tempo ekkoni la lokon mem.

Post tempo iuj renkontiĝoj restas en la memoro, iuj paliĝas, kaj mi ĝis nun ne komprenas la kaŭzon, kial okazas tiel diverse. Eble, la etoson faras tiaj malgrandaĵoj, pri kiuj oni eĉ ne rememoras, sed resentas ie profunde. Mi ne scias, kio estis tiuj momentoj, sed dum LT ili certe ĉeestis. La bona etoso restigis la volon por ree veni, malgraŭ la distanco sufiĉe longa inter niaj urboj.

Dankon al Raja pro la gastigo, al Vladimir, al multaj aliaj, al Roman pro intelektaj ludoj kaj al ĉiuj venintoj pro novaj impresoj!

Lidija Jerofejeva (Niĵnij Tagil)

Unue, mi volus skribi kelkajn vortojn pri la novembra lingvotrejnado. Mi ĉeestis tie la unuan fojon. La spertoj, kiujn mi ricevis, superis miajn atendojn. Ĉio estis organizita sur bonega nivelo. La programo estis enhavoriĉa, interesa, vigla kaj kreita por diversaj gustoj kaj aĝoj. Neniu enuis. Eĉ vespere ne estis paŭzoj, kaj al esperantistoj ĉiam estis proponata io interesa: ludoj, konkursoj, diskuto! Rajeĉka kaj ŝia teamo superis sin mem!

Due, la lecionoj por la nivelo B (mi ne povis ĉeesti en la lecionoj de A-nivelo) sendube brilis samkiel la okulvitroj de la instruisto! Ili evidentiĝis ĝuindaj, variaj, viglaj kaj pensigaj. La lernantoj ne havis eĉ sekundon por enui! Mi nur povas imagi kia streĉa laboro antaŭis la eventon! Kaj mi ankaŭ volas danki al Volodja por la fortoj kaj energio, kiujn li senlace donacis al ni dum siaj neforgeseblaj lecionoj! Kaj por lia senavareco, por liaj libroj, kiujn li eldonigis kaj donacis al la plej aktivaj partoprenintoj!

Kaj trie, al mi tre plaĉis la intelektaj ludoj de Roman Jefremov! Mi mem ne povis respondi multajn demandojn, tamen mi sentis min feliĉa kuniĝi kun la samideanoj en la varma etoso, bonega kompanio el diversaj urboj de nia lando! Mi vidis sufiĉe junajn interesajn klerulojn! La koro batis ĝoje, ke ni havas tiom da talentaj esperantistoj!

Mi esperas, ke similaj rendevuoj okazos regule en Uralo! La lingvotrejnado montris, ke ni havas kapablan Esperantan societon!

Aleksandra Osipova (Jekaterinburg)

La tria lingvotrejnado en Jekaterinburg estis antaŭlonge atendata evento de la aŭtuno. Ja tio estas jam preskaŭ tradicia Esperanto-aranĝo ne nur por uralanoj, sed ankaŭ por esperantistoj el multaj aliaj urboj de Rusio. Tio estis kaj bona ebleco renkontiĝi kun malnovaj amikoj kaj ekkoni novajn samideanojn; kaj profundigi siajn sciojn pri Esperanto kaj havi bonan lingvan praktikon; kaj komunikiĝi pri diversaj temoj kun tre interesaj homoj; kaj prezenti iujn siajn kreajn talentojn; kaj eĉ poste kune, en granda amika kompanio, partopreni la enurbajn kulturajn programerojn, kiel ekzemple spektaklon en la teatro de muzika komedio.

Mi kore dankas ĉiujn niajn instruistojn – Vladimir Opletajev, Darja Zelenina, Irina Gonĉarova, Tatjana Vŝivceva – pro ilia kontribuo al la klerigado de ĉiuj, kiuj lernas Esperanton, kaj pro ilia senavara divido kun ni, la lernantoj, de siaj scioj pri la lingvo!

Apartan grandan dankon al Raja Kudrjavceva kaj Pavel Veselov pro la ĉiama bonega organizado kaj senriproĉa okazigo de la aranĝo!

Varman saluton al ĉiuj partoprenintoj de la trejnado, kaj ĝis novaj renkontiĝoj!

Pjotr Fedosov (Moskvo)

Ĉi-novembre en urbo Jekaterinburg okazis la 3-a aŭtuna Lingvotrejnado, kiun mi sukcesis partopreni kune kun ankoraŭ kelkaj moskvanoj kaj apudmoskvanoj: Irina Gonĉarova (Mirina), Aleksandr Basov (Karter), Aleksandr Lebedev (Norden) kaj Natalja Laziĉ (Mildina).

La renkontiĝo al mi tre plaĉis. Mi sukcesis viziti kaj la diligente faritajn lecionojn de s-ro Opletajev (Surgut), kaj dialogaĵojn kaj aktivaĵojn de Darja Zelenina (Ĉeljabinsk), kaj ludojn de Roman Jefremov (Glazov), kaj "rondan tablon" de Irina Gonĉarova (Odincovo). Ĉiuj lecionoj estis interesaj kaj (kio gravegas) unikaj. Unu leciono malsimilis la alian, eĉ faritaj de la sama instruisto lecionoj ne tre similis.

Krom la lecionoj, estis, certe, komunikado en Esperanto, kiu, mi esperas, plaĉis al ĉiuj (krom krokodiloj, sed krokodilado preskaŭ ne estis tie), do ankaŭ al mi.

Fine, mi volas diri, ke tio ne estis la lasta mia Lingvotrejnado. Kaj, eble, iam mi venos jam kiel instruisto!

NEKROLOGO

La 7-an de decembro en Nikopol (Ukrainio) mortis pro infarkto nia samideano Valerij Jeroĥin.

Valerij naskiĝis la 22-an de oktobro 1935. En Irkutsk, kie li estis pedagogo en muzika lernejo, li instruis Esperanton al siaj studentoj. Kelkaj el ili fariĝis famuloj: pedagogo de muziko, ĵazisto Vladimir Romanenko (li estis instruisto de la fama pianisto Macujev), doktoro de medicino, merita kuracisto de Rusia Federacio Vladislav Okladnikov kaj neordinara poeto kaj prozisto Igorj Golubev (konatiĝu kun lia "Третье обращение инопланетян к жителям Земли" ("La tria mesaĝo de aliplanedanoj al la loĝantoj de Tero"), kiun esploris Akademio de sciencoj kaj konsideris vera sendaĵo de aliplaneda racio).

Valerij en 60-aj jaroj transloĝiĝis al Kolomno, kie tiutempe estis aktiva E-grupo. Iam mi montris al li artikolon en populara gazeto "Техника – молодежи" ("Tekniko por junularo"). En la artikolo temis pri iu juna esperantisto el Irkutsk, kiun iu psikologo hipnotis kaj sugestis, ke tiu estu en fora estonto. La junulo ekparolis Esperante kaj miris, ke oni apud li ĝis nun parolas ruse. Evidentiĝis, ke Esperanton instruis al la junulo Valera, kaj la hipnotisto estis moskva psikologo Jegides, kiu en iu "Velura Sezono" sukcese prezentis seancon de hipnoto.

Jeroĥin estis kabineta esperantisto, ne partoprenanta eksterurbajn aranĝojn de kolomnaj esperantistoj. Mi ofte interesiĝis pri lia Esperanto-vivo kaj ĉiam aŭdis ion novan. Li rememoris, ke en 1956, kiam li estis studento de konservatorio en Moskvo, baldaŭ post la nokta raporto de Nikita Ĥruŝĉov pri la "kulto de personeco", li ekvidis en la konservatoria biblioteko artikolon, en kiu oni menciis Esperanton lige kun la alproksimiĝanta Tutmonda Festivalo de Junularo kaj Studentoj. "Strange, – ekpensis li – la lingvo aperis antaŭ 70 jaroj, sed mi neniam aŭdis pri ĝi". Valerij tuj vizitis la ŝtatan bibliotekon, trovis tie iun antaŭrevolucian lernolibron de Esperanto kaj transskribis ĝin plene, kun la vortaro. Preskaŭ samtempe en proksima brokantejo li trovis la dikan "Fundamenta krestomatio" kaj parkerigis ĝin. Tiutempe li sciis nur la germanan kaj pensis, ke li estas la sola esperantisto en Sovetunio.

Dum la festivalo Valerij ekaŭdis surstrate paroladon en Esperanto – estis grupo de junaj esperantistoj el okcidenta Germanio – aliris kaj iĝis interpretisto por ili. Post unu jaro en la centra Muzeo de muzika kulturo oni ekinteresiĝis pri taglibro de la fama komponisto Taneev, kiun tiu dum duonjaro verkis en Esperanto, kaj, hazarde eksciinte, ke Valerij posedas la lingvon, proponis al li traduki la taglibron al la rusa – estis la unua perlaboraĵo de la tiama studento Jeroĥin.

Jeroĥin estas vera rusa intelektulo en la plej bona senco de la vorto. Vere talenta, scianta multon pri multo. Loĝante en Kolomno, li laboris en Moskvo – estis gvida scienca laboranto en la ŝtata Instituto de artscienco, unu el redaktoroj de la centra eldonejo “Музыка” (Muziko). Kelkfoje semajne li veturis al la laborejo per elektrotrajno (tien-reen dum ĉ.5 horoj). Ne estante kandidato, li fariĝis doktoro de artoscienco dank’ al la fundamenta verko “De musica instrumentalis (Germanio 1960-1980)”. Li perfekte posedis kelkajn fremdajn lingvojn: tradukis muzikajn librojn el la germana kaj la angla kaj el la rusa al la angla tradukis “Conversations with Witold Lutoslawski”. Interesa fakto: kiam li estis redaktoro en eldonejo «Музыка», oni okupiĝis pri eldono de la 3-voluma taglibro de Tanejev kaj alportis al li tradukon de la Esperanta parto, li ekvidis sian laboron, plenumitan en junecо.

Zajdman Jefim ***(Jalta)***

STELO, FALINTA EL LA ĈIELO

La homoj, karaj por vi, iĝas integra parto de via esto. Kaj kiam vi ricevas sciigon pri morto de iu el tiuj homoj, vi komprenas, ke mortis ankaŭ parto de vi mem.

Ĝuste tian animstaton havas mi nun post informo pri la pereo de Jefim Zajdman. Pasis nur iom pli ol unu jaro post kiam mi lastfoje vidis lin, kaj nur semajnon antaŭ lia forpaso mi lastfoje mesaĝis al li. Mi proponis al li aboni por 2018 la revuon «Uralskij sledopit» (Urala esploristo), kie estas planata publikigo de materialoj pri uralaj gemoj kun aldono de specimeno de tiuj gemoj en ĉiu kajero. Mi opiniis, ke por Jefim tio estus interesa, ĉar unu el liaj lastaj vervaj ŝatokupoj estis ne nur kolektado, sed ankaŭ prilaborado de valoraj ŝtonoj. Li eĉ aranĝis tiucele metiejon en sia loĝejo en Jalta. Dum la Krimeaj Esperanto-tagoj (2016) li prezentis al ni sian kolekton de belegaj gemoj kaj al multaj aktivaj partoprenintoj de la aranĝo donacis memfaritajn ŝtonajn suvenirojn, ankaŭ al mi.

Pri mia percepto de la neordinara personeco de Jefim mi skribis en mia artikolo «La nova ponto», publikigita en № 86 de la Bulteno de REU. Tiam ial la redaktoro de la Bulteno ne publikigis la fotojn, aldonitajn al la artikolo. Nun mi ripete proponas la foton kun Jefim, kiun mi faris tiam, ĉar ĝia valoro nun sendube plialtiĝis.

Semajnon post la forpaso de Jefim mi tradukis al Esperanto malnovan anglalingvan kanton «Still I'm Sad» el repertuaro de la fama muzikgrupo «Boney-M». Tio okazis certe pro la funebro en mia animo pro perdo de la kara por mi homo:

Vidu stelojn falantajn el la ĉiel'.
Viajn larmojn fluginte kisis la stel'.
Viajn harojn tenere tuŝas vento de juni'.
Vidu pluvon brilantan per fajna stri'.
Tristas mi!
Miajn sentojn dronigas ĉiu tagson'.
Nokto trovos la lokon de tiu dron'.
Mian koron trablovas vent' de la disiĝ' kun vi.
La sopiro obsedas min ĉiam pli.
Tristas mi!
Ho, tristas mi!
Ho, tristas mi!

Ludmila Novikova (Moskvo)

REPREZENTANTO DE UEA ALPAROLIS LA PLENAN SESION DE LA 39-A ĜENERALA KONFERENCO DE UNESKO

La 6-an de novembro 2017 reprezentanto de UEA faris triminutan paroladon antaŭ dumilo da diplomatoj, aktivuloj kaj oficistoj el la tuta mondo en la plena sesio de la 39-a Ĝenerala Konferenco de Unesko, okazinta ĉe la sidejo de Unesko en Parizo. Nur dudeko da internaciaj neregistaraj organizaĵoj (NRO-oj) ricevis tian lokon en la tagordo. La voĉo kaj la vizaĝo de UEA estis tiuj de Rakoen Maertens, juna aktivulo el Belgio kaj komisiito de TEJO pri agado ĉe Unesko.

Dum sia interveno Maertens emfazis la kernan gravecon de komunikado en la laboro de Unesko. Tamen, en internaciaj medioj, "komunikado ne ĉiam estas, kia ĝi ŝajnas esti. Estas baroj."

Emfazante ĝian longan kunlaboron kun Unesko, Maertens elstarigis la aktivan engaĝiĝon de UEA por "profunda komunikado, lingva kaj kultura egaleco, lingva diverseco kaj interkultura interŝanĝo." Li kaptis la okazon ankaŭ por mencii la 100-an datrevenon de la forpaso de Lazaro Ludoviko Zamenhof, solenatan sub aŭspicio de Unesko, kaj la lastatempan aperigon de la Unesko-Kuriero en Esperanto, kies ekzempleron li montris dum la parolado.

La parolado finiĝis per inspiraj vortoj kaj bondeziroj por "profunda, signifoplena kaj konstruema dialogo, en malferma interkompreniĝemo". Maertens krome invitis la ĉeestantojn al solena aranĝo ene de la Unesko-konstruaĵo la 11-an de decembro, organizata de la Unesko-teamo de UEA kunlabore kun la pola Unesko-delegacio, por oficiale fermi la Zamenhof-Jaron.

Gazetaraj Komunikoj de UEA

BULTENO de REU

apartaj materialoj el la novembra kaj decembra numeroj

Pri Nikolaj Incertov en ekspozicio memore al stalinaj viktimoj

La 31-an de oktobro en "Muzeo de avangardo" (Galerio ĉe Ŝabolovka) malfermiĝis ekspozicio, dediĉita al viktimoj de politikaj reprezalioj. Ĝi rakontas pri tiuj, kiuj loĝis en la kvartalo, kie troviĝas la galerio (ĉiuj 15 domoj de la kvartalo – eksperimenta konstruaĵo en konstruktivisma stilo far arkitekto N. Travin – havis iam la saman numeron – 11 laŭ Ĥavsko-Ŝabolovska strateto). Ekde 1937 ĝis 1939 el ĝi OGPU-NKVD arestis 24 homojn; ĉiuj estis pafekzekutitaj. Inter ili estis tajloro, kinofilmisto, kuracisto-epidemiologo, aktoro, tekstokorektisto, direktoro de fabriko, senlaborulo… Ili havis nenion komunan, krom la loĝloko.

Okaze de la 80-jariĝo de la Granda Teroro en la Tago de politikaj reprezaliitoj la muzeo

Sur la foto (de maldekstre): Fama usona kantisto Paul Robson, malantaŭ li staras Nikolaj Incertov; sidas: famaj sovetiaj poetoj Miĥail Svetlov (en okulvitroj) kaj Lev Kassil, dekstre — Ernest Drezen, ĝenerala sekretario de CK SEU.

decidis rakonti pri 5 el la mortigitoj, pri kiuj la muzeaj kunlaborantoj kaj lokaj aktivuloj (Aleksandra Selivanova, Inna Drobinskaja k.a.) faris arkivajn esplorojn. Inter ili estas ankaŭ unu fama esperantisto – Nikolaj Incertov (1896-1937), dum longaj jaroj respondeca sekretario de SEU. Por pliĝustigi la donitaĵojn pri Incertov, la organizantoj de la ekspozicio turnis sin al REU. De esperantistoj ili ricevis certajn informojn, tradukojn al la rusa de kelkaj materialoj kaj ĝeneralajn skizojn pri la reprezalioj kontraŭ esperantistoj, ankaŭ kelkajn malnovajn eldonaĵojn por ekspono. Dum la malfermo de la ekspozicio ĉeestis Nikolao Gudskov kaj Valentin Seguru, Gudskov elpaŝis pri Incertov kaj persekutoj kontraŭ esperantistoj.

Nikolao Gudskov

Stato de la movado en Ĉuvaŝio

La 22-an de oktobro en Ĉeboksaro pasis la 22-a Lingva Festivalo, kaj vesperon antaŭe kelkaj malnovaj ĉeboksaraj esperantistoj venis por renkontiĝi kun Irina Gonĉarova, REU-respondeculo pri la regiona agado.

La ĉeestantoj esprimis siajn pensojn kaj sentojn pri la nuna stato de la esperantista vivo en Ĉuvaŝio.

Ĉiuj konsentis, ke la teritorio de Volgio estas tiom granda, ke ĉiu ĝia federacia subjekto devas havi sian kunordiganton, kunlaborontan kun la Volgia kunordiganto Ildar Kijamov. Kompreneble, neniu el la kunvenintoj estis preta tuj surpreni la taskon prizorgi Ĉuvaŝion.

Komence sonis nur opinioj, ke por la skipo de la eksaj aktivuloj – kun familioj kaj infanoj – la tempo de aktiva agado pasis, ke estingiĝis la iama flamo kaj nun jam nenio en Esperantujo entuziasmigas ilin.

La motoro de Ĉuvaŝa Esperantujo Aleksandr Blinov diris, ke forestas la flamiga ideo: kunveni pro nura lingva praktiko ("la lingvo por la lingvo mem") ne indas penojn kaj tempon; li mem nun dediĉas sin al la nacia agado, ĉar tie la idea ero estas multe pli evidenta. Restante firma esperantisto, li tamen, ĉiam pretas subteni E-agadon. Li multe prelegas en altlernejoj kaj elpaŝas antaŭ ekstera publiko – kaj ĉiam mencias Esperanton. Eksonis voĉoj, ke jes, tamen, necesas informi kaj instrui novajn homojn, eble eĉ necesus reveni al E-dissendoj al la regionoj por semi Esperanton tie.

Iom post iom aperis konkretaj proponoj.

Sergej Tiĥonov por revizii ĉuvaŝan esperantistaron proponis revivigi la dormantajn Esperantajn VK- kaj Fb-grupojn. Olga Ivannikova ŝatus regule kolektiĝi familie kaj okazigi "infanajn ĉambrojn" por po iom instrui al ili Esperanton. Daniil Kapitonov trovis interesa renkontiĝi kun la fama mondvojaĝanto kaj motivigi lin dum la planata vojaĝo tra Eŭropo uzi/popularigi Esperanton. Por Aleksandr Blinov estas neniu problemo organizi prelegojn

aŭ agitadojn en mezlernejoj, inviti dezirantojn al la E-kurso. Al li apartenas la luksa ideo inviti 2-3 eksterlandanojn el diversaj mondopartoj por rondvojaĝado tra Ĉuvaŝio kaj najbaraj respublikoj kun rakontoj pri Eo en urboj kaj vilaĝoj.
Malofte okazas, sed tiu ĉi renkontiĝo tuj donis siajn fruktojn.
Reaktiviĝis la VK-grupo "Эсперанто в Чебоксарах" <https://vk.com/esperanto21>:
– jam la 21-an de oktobro Sergej Tiĥonov publikigis detalan ruslingvan raporton pri tiu ĉi renkontiĝo, kun multaj utilaj ligoj (inter cetere – al nia MIA MASI), kaj anoncis, ke REU serĉas kunordiganton por Ĉuvaŝio;
– la 23-an de oktobro Aleksandr Blinov, reage al la preparata rusia leĝo pri nedeviga lernado de naciaj lingvoj en lernejoj, publikigis la mesaĝon, daŭrigante la temon pri la idea esenco de Esperanto: "La rolo de esperantistoj en la moderna mondo ne tiom estas strebi al la virtuala interkompreniĝo, sed fakte en la reala defendo kaj pluekzistigo de la lingva diverseco. Perdigi la regionajn lingvojn signifas perdigi la ideon de la planlingvo internacia kiel Esperanto. Ĉu ni esperantistoj kapablas subteni realan lingvan diversecon helpante al la ĉuvaŝa lingvo pluvivi kaj esti daŭre studata en mezlernejoj?"
– la 27-an de oktobro aperis alvoko de Irina Jakovleva por restarigi regulajn kunvenojn de la ĉeboksaraj esperantistoj kun la demando, kiun tagon oni elektu por la ĉiumonata kunveno (voĉdonis 22 personoj);
– Aleksandra Moiseeva, vizitinte la prezenton de Esperanto dum la Lingva Festivalo, konfesis, ke ŝi ekentuziasmiĝis denove – kaj invitis ĉiujn al la E-kurso ĉe la lingva kursejo "Язык для успеха";
– kaj la eterna komencantino Formiko denove ekdeziris lerni Esperanton! ;)

Irina Gonĉarova

Premio por interlingvistika libro

Ĉi-jare en la mallongan liston de la premio "Klerigisto" (Prosvetitel), kiun oni aljuĝas al la aŭtoroj de la plej bonaj scienc-popularaj ruslingvaj libroj (la premio ekzistas ekde 2008), eniris (en la nominacio "Humanaj sciencoj", inter aliaj 4 verkoj) la libro de Aleksandr Piperski "Konstruado de lingvoj. De Esperanto ĝis dotrakia" (Александр Пиперски, «Конструирование языков. От эсперанто до дотракийского», издательство «Альпина нон-фикшн», 2017). La fondintoj de la premio ne nur donas monsumon al la aŭtoroj (700 mil RUR al la gajninto, po 100 mil al la trafintoj en la mallongan liston), sed ankaŭ dissendas kompletojn de la premiitaj libroj al bibliotekoj de la tuta Rusio.

La libro de Piperski temas pri diversaj specoj de artefaritaj lingvoj – filozofiaj kaj logikaj, uzataj en beletraĵoj ktp, kaj inter ili pri internaciaj "helpaj" lingvoj, inkluzive, certe, Esperanton – bedaŭrinde, ne sen kelkaj eraroj pri ĝiaj historio kaj gramatiko. Piperski ne estas nia amiko, nek, samtempe, malamiko. Lia merito estas (same, kiel merito de Umberto Eco), ke li konsideras "artefaritajn lingvojn" objekto de scienca intereso kaj esploro, kaj objektivisme (kio ne egalas objektivecon!) ilin konsid-

eras. Ekzemple, li abunde ripetas antaŭjarcentajn lingvistikajn kritikojn kontraŭ Esperanto (sed ne parolas pri kaŭzoj de ĝia sukceso), sed samtempe, sufiĉe trafe rakontas pri disvastigeco de Esperanto kaj kvanto de ties parolantoj.
Ĉu li ricevos la unuan premion (klaros la 16-an de novembro), ĉu ne, lia libro altiras atenton al interlingvistiko ĝenerale kaj al Esperanto speciale, kaj ĝia trafo al la mallonga listo (kaj eventuala premio) certe disvastigos sciojn pri la afero en la interesiĝantaj amasoj – ja la vorto "Esperanto" trovis lokon eĉ en la titolo!
Interesiĝantoj povas trovi la libron en la reto kaj pumpi ĝin por legi en elektronika (bita) formo, ekzemple en: <http://mrutor.org/torrent/809469/aleksandr-piperski-konstruirovanie-yazikov-ot-esperanto-do-dotrakiyskogo-2017-fb2>.

Nikolao Gudskov

La Unua Bulteno pri RET-2018

Laŭ la decido de REU-Estraro Rusiaj Esperanto-Tagoj en 2018 okazos en la eksa bieno de negociisto Neburĉilov, nuna ripozejo en pina arbaro ĉe la bordo de la rivero Teza, je kelkaj kilometroj de la antikva urbo Ŝuja en Ivanova provinco.
Datoj: 1-a – 8-a de julio 2018.
Ĉefa temo: "Genaracia stafeto".
La Organiza Komitato estas fondata, pliaj informoj, aliĝilo kaj ĉio cetera sekvos.

Esperantisto de la jaro 2017: Raja Kudrjavceva

Raja Kudrjavceva (Rafija Jafasova) esperantistiĝis en 1980 en Samarkando kaj tuj ekaktivis en Uzbekia esperantista movado. En 1994 ŝi transloĝiĝis en Sverdlovskon (Jekaterinburgon) kaj por ĉiam ligis sin kun la loka esperantista agado ne nur en la Urala ĉefurbo, sed ankaŭ en la tuta vasta Urala regiono de Rusia Federacio. Ŝiaj organizaj, kolektivigaj kaj inspiraj talentoj kaj kapabloj speciale riveliĝis en la lastaj dudek jaroj, kiam aktualiĝis novaj kunagadaj laborformoj inter esperantistaj kolektivoj kaj apartaj aktivuloj.
Raja estas unu el la iniciatintoj kaj ĉeforganizantoj de preskaŭ ĉiuj printempaj ural-siberiaj esperantistaj renkontiĝoj EsPrimo (Esperantista primavero), kies senlaca antaŭeniganto kaj zorgema protektanto ŝi estadis dum 15 jaroj. Danke al ŝiaj klopodoj la EsPrimo-partoprenintoj (entute pli ol 500!) havis ŝancon ĉiuprintempe ĝui amikan esperantistan medion kaj alfronti variajn temojn de movada, arta, kulturkleriga enhavoj.

Ŝia aparte preferata elemento estas aprezo de kulturaj valoroj. Krom organizi por jekaterinburgaj esperantistoj kaj gastoj el proksimaj urboj kaj krom gvidi diversajn Esperantajn programojn, dediĉatajn jen al poeziaj kaj literaturaj temoj, printempaj kaj aŭtunaj kunvenoj, jen al tradiciaj Zamenhof-festoj, ŝi konstante venigas samurbajn esperantistojn al muzikaj koncertoj kaj festivaloj aŭ teatraj spek-

takloj. Multan atenton ŝi dediĉas al pli juna esperantista generacio, konsiderante tion tre grava zorgo kaj agadkampo bezonata por krei vojon al estonteco, por kontinuigi tradiciojn, por konstrui pontojn inter spertaj kolegoj kaj novaj esperanistoj. Tion celas ankaŭ tre komplikaj el la organiza vidpunkto regionaj Esperantaj studadoj-lingvotrejnadoj en Jekaterinburgo, kiujn volonte partoprenas gastoj el diversaj urboj de Rusio. La iniciatita de Raja Kudrjavceva lingvotrejnado estas tre konvena scenejo por movadaj spertinterŝanĝoj kaj profesinivela metiejo por instruistoj de Esperanto.
Raja Kudrjavceva estas multjara membro de REU. Ŝi apartenas al konstantaj aŭtoroj de REGo kaj de "Bulteno de REU". Ŝiaj mesaĝoj, informaj materialoj kaj diverstemaj raportaĵoj formas konsiderindan bazon de la tuta informa fluo en la paĝaro "Ural-Siberia esperantista movado" kaj en la dissendolisto de uralaj esperantistoj.
Ankaŭ en ĉi tiu jaro, kiu bedaŭrinde, kiel kelkaj lastaj jaroj, estas por Raja tre malfacila, ŝi spite al skuaj sortobatoj ne estingis sian elanon de senlaca organizanto kaj faris multon utilan kaj interesan por samurbaj kaj uralaj esperantistoj. Kune kun kelkaj geamikoj ŝi organizis la tradiciajn printempan, someran kaj aŭtunan kunvenojn de jekaterinburgaj samideanoj. Apartan atenton ŝi dediĉis al la tuturala reta projekto "Esperanto-130", kiun ŝi mem iniciatis, kunordigis kaj gvidis ekde printempo ĝis la interurba festa renkontiĝo, organizita de ŝi kaj dediĉita al la 130-jara jubileo de Esperanto. Tri aŭtunaj monatoj plene forprenis ŝiajn tempon kaj fortojn por organizi kaj sukcese okazigi novembre Esperanto-studadon en Jekaterinburgo – jam la trian lingvotrejnadon kun ĉirkaŭ kvardek partoprenintoj el 18 rusiaj urboj! Dum proksimaj tri monatoj Raja kaj ŝiaj koleginoj estos realigantaj ampleksan tuturalan retan projekton "Fotoj el mia albumo", celantan krei arkivon de interesaj fotoj el la vivo de uralaj esperantistoj. La eventoriĉan jubilean jaron kronos la tradicia Zamenhof-festo en Jekaterinburgo, pri kiu Raja havas jam interesajn ideojn kaj al kiu jam estas invitataj geamikoj el uralaj urboj.
Fine mi citu alineon el la intervjuo "Tra jaroj fuĝantaj" <http://ural-sib.org/eo/tra-jaroj-fugxantaj-intervjuo-kun-raja-kudrjavceva>: "Raja Kudrjavceva apartenas al rara grupo de ekskluzive engaĝitaj esperantistoj, plene kaj senrezerve fidelaj al Esperanto, kies praktika kaj multbranĉa aktivado servas kaj al la lingvo kaj al la progeso de la esperantista movado. Oni kutimas epiteti tiajn homojn per la substantivo "motoro", komparante ilin kun tiu senlace funkcianta ilo, kapabla ne nur transformi jam ekzistantan energion, sed en la samideana medio ankaŭ krei sinergion tiel bezonatan por akceli kunagadon de diversaj homoj, direkti ilin al sukcesigo kaj realigo de samcelaj taskoj."

Vladimir Opletajev

Esperanto en la 12-a Moskva lingva festivalo

La 12-a Moskva Internacia Lingva Festivalo okazis la 10-an de decembro 2017 en la Centro de Pedagogia Majstreco. La festivalon organizis Moskva Esperanta Asocio MASI. La gvidajn rolojn en la organizado havis la junaj MASI-anoj Aleksandr Basov, Aleksandr Lebedev, Sofja Zareckaja kaj Maksim Silantjev. 10 niaj membroj kontribuis al la programo kiel lingvoprezentantoj. Entute estis prezentitaj 60 lingvoj, 20 prilingvistikaj prelegoj, 15 metodikaj seminarioj kaj 10 naci-kulturaj programeroj. Funkciis Infana Spaco. Al la organizado kontribuis 37 teamanoj (el kiuj – 28 MASI-anoj) kaj deko da volontuloj, la programon – 100 prelegantoj. La festivalon vizitis ĉirkaŭ 800 gastoj. La tuta partoprenantaro tra la tago – ĉirkaŭ 1000 personoj.

Jam dum 12 jaroj Moskva Esperanta Asocio MASI organizas Moskvajn Internaciajn Lingvajn Festivalojn (MLF). Ne evidenta por ĉiuj festivalanoj, sed tute klara por la ĉeforganizantoj, la celo de niaj Festivaloj estas promocii Esperanton – koincide kun la ideo de Dennis Keefe, la aŭtoro kaj la unua realiginto de la tiutipa prilingva aranĝo en la jaro 1995, en Francio.
Esperanto ĉiam forte rimarkeblas en MLF. La 12-a ne estis escepto. La presita papera programo, sen kiu ne eblas orientiĝi en la Festivalo, kiel ĉiam, enhavis klarigojn pri MEA MASI kun invitoj al la kursoj kaj aliaj E-aranĝoj. Dum la Solena Malfermo la gvidantoj tradicie rakontis pri la rolo de Esperanto en la apero de la lingvaj festivaloj kaj dum la Parado de Prezentantoj logike sonis alvoko al ĉiuj neesperantistoj viziti la prezenton de nia lingvo por pli bone kompreni la ideon de la lingvaj festivaloj. Esperanto estis prezentita dufoje de Irina Gonĉarova kaj de Pjotr Fedosov en plenplenaj klasĉambroj.
En MLF-12 Esperanta temo akiris novan evoluon. La unuan fojon dum la rusiaj festivaloj estis organizita la Infana Spaco, kiu funkciis 8 horojn kun la partopreno de pli ol 50 infanoj tra la tago. Ĉar zorgis pri la evento la nova, tial tre entuziasma MASI-anino Tatjana Moĵnjakova kaj la plej grandan parton de la infana programo gvidis sep niaj samasocianoj, ĝi enhavis multajn erojn pri aŭ eĉ en Esperanto: scenigo de fabeloj, kvizoj, konkursoj de poliglotoj, traduko el Esperanto ktp. Tre sukcese pasis la surskribado de bildkartoj por la Esperanta Poŝtkruciĝo <https://bildkarto.weebly.com/>, kiun partoprenis pli ol 20 geknaboj.
Ĉe la Solena Fermo dum la muzika kvizo, kiam necesis diveni, en kiu lingvo estas kantata iu konata kanto, niaj gvidantoj anoncis: “La sekva kanto estas en la plej populara lingvo de tiu ĉi festivalo”, – kaj la tuta salono kriis: “Esperanto!”.
Pliajn informojn pri MLF eblas trovi ĉe <http://www.lingvafestivalo.info/>.

Irina Gonĉarova, direktoro de MLF

30-jariĝo de la klubo «Lev Tolstoj»

La Zamenhof-tago en la klubo “Lev Tolstoj”, okazinta 11.12, estis dediĉita ne nur al Zamenhof kaj E-libroj, sed ankaŭ – kaj plejparte – al la 30-jara jubileo de la klubo.
Venis (el Brjansko) la fondinto de la klubo Anatolo Gonĉarov, kiu multe rakontis pri diversaj etapoj de la kluba vivo, metodoj de kluba laboro. Sonis interesaj rememoroj.
La etoso estis amikema, gaja kaj tre malstreĉa. La kunvenon kronis komuna kantado, fotado kaj teumado kun libera babilado.

Al la 30-jariĝo de la Moskva Esperanto-klubo "Lev Tolstoj"

Tridek jarojn la klubo funkcias.
Ĝia lingvo jubilas parole.
Esperanto per si emocias
Kaj alvokas bonfide-bonvole.

Esperanto riĉiĝas kaj brilas
En la lingvomedio aktiva,
Kaj neniam la klub' krokodilas,
Konservante la lingvon plu viva.

Tridek jarojn kunigas la klubo
Esperanto-logatojn fidele,
Ebligante, sen ombro de dubo,
Novajn ŝancojn plu vivi pli bele.

Imageblas ne ĉiu en rolo
Gvidi homojn sur voj' kvazaŭ vana.
La fondinto de l' klub' Anatolo
En la klubodankem' estu sana.

Esperanto en l' art-akompanoj
Vekas kredon je sia prestiĝo.
Venu al "Lev Tolstoj" novaj anoj,
Al la esperantista kuniĝo.

Jaroj kuru, impetu aŭ drivu,
Traktu sortojn favore aŭ trete,
Sed sen velk' Esperanto plu vivu,
Kaj la klubo plu vivu bonstate!

Klara Ilutoviĉ

60 jaroj en Esperantio

Antaŭ 60 jaroj, la 30-an de novembro 1957, mi komencis lerni Esperanton.
Jen mia tiama foto.
Ekde tiu tempo pasis 6o jaroj de mia tre interesa kaj aktiva vivo en Esperanto-lando.
Antaŭ tri jaroj, okaze de mia 75-jariĝo, REGo № 4 (83), 2014 publikigis miajn koncizajn rememorojn.
Ĉi tie ili estas legeblaj (aŭ relegeblaj) sen fotoj, sed kun referencoj al aliaj retaj publikaĵoj, kiujn vi povas malfermi:

<http://www.esperanto-mv.pp.ru/Cetero/Mia_vivo_en_Esperanto-lando.html>.
Ĉi tie miaj rememoroj estas legeblaj kun fotoj:
<http://www.esperanto-mv.pp.ru/Cetero/Mia_vivo_en_Esperanto-lando.pdf>.
Jen la versio, kiu pli frue aperis en Panteono de la retejo edukado.net:
<http://www.edukado.net/biblioteko/panteono?iid=94&s=96f6654f97598835e787c1b382965b49>.
Jen estas la libreto de Nikolaj Andrejev, per kiu mi lernis Esperanton en la 1957a jaro: <https://www.ozon.ru/context/detail/id/26352103/>. Konciza gramatiko, vortareto, eĉ ne unu frazo en Esperanto!

Boris Kolker

Alvoko

Ekde 2018 REU lanĉas kulturan kaj beletran suplementon al sia Bulteno (la titolo ankoraŭ ne estas difinita). Tial ni petas ĉiujn verkemulojn – poetojn, prozistojn, tradukistojn, literaturajn kritikistojn, esperantologojn kaj verkistojn de scienc-popularaj tekstoj – sendi siajn eventualajn kontribuojn al la retadreso <nikolao@yandex.ru>.
La solaj kaŭzoj por rifuzo de publikigo de la verkoj povas esti 1) troa grandeco (romanon, eĉ genian, ni publikigi ne povos); 2) malalta lingva nivelo (korekti tro da gramatikaj eraroj estas ekster niaj ebloj) kaj 3) verkoj kun nekomprenebla aŭ tro malbela stilo. Ĉio cetera aperos sen cenzuro (sed ne sen literatura redaktado!).
La suplementon aŭtomate ricevados ĉiuj membroj de REU, kiuj ricevas REU-bultenon, sen iu ajn aldona pago.

Estraro de REU

BELARTAJ KONKURSOJ DE UEA EN 2018

La Sekretario de la Belartaj Konkursoj de UEA, unu el la plej gravaj kaj jam klasikaj manifestiĝoj de la E-kulturo, invitas verkemulojn al partopreno en ilia 68-a okazigo. La rezultojn oni anoncos kadre de la 103-a Universala Kongreso en Lisbono. Kiel kutime, partopreno estas libera al ĉiuj kaj ne ligita kun aliĝo al la UK. La konkursaĵoj devas esti neniam antaŭe publikigitaj en ajna formo, krom en la branĉo *Infanlibro de la Jaro*. Oni rajtas sendi maksimume tri konkursaĵojn por sama branĉo aŭ subbranĉo. Endas sekvi jenajn regulojn:

Poezio: maksimuma longo ne fiksita.

Prozo: maksimuma longo 200×65 karaktroj (kvino da paĝoj).

Prozo, subbranĉo mikronoveloj: (maksimuma longo 100 vortoj). Aljuĝata estas nur unu premio, kiu nomiĝas *Premio Paula Adúriz*.

Teatraĵoj: maksimuma longo ne fiksita.

Teatraĵoj, subbranĉo monologoj (unupersonaj teatraĵoj) kaj skeĉoj (unu-aŭ divers-personaj): daŭro inter 10 kaj 15 minutoj. Aljuĝata estas nur unu premio, kiu nomiĝas *Premio María Cuevas*.

Eseo: teme ligita kun Esperanto aŭ kun la kongresa temo, proksimuma longo 400×65 karaktroj (deko da paĝoj). La unua premio nomiĝas *Premio Luigi Minnaja*.

Infanlibro de la Jaro: originala aŭ tradukita libro por infanoj presforme aperinta en 2017. Aljuĝata estas nur unu premio.

La absoluta limdato por ricevo de konkursaĵoj estas la 31-a de marto 2018.

Oni sendu po unu ekzempleron de ĉiu konkursaĵo – krom en la branĉo Infanlibro – al *Belartaj Konkursoj de UEA*, ĉe *Miguel Gutiérrez Adúriz*, prefere retpoŝte al la adreso: <sciosfero@gmail.com>; aŭ, se tio ne eblas, papere al la adreso: *los Coteros 1-C, 2 Izda, 390600 Muriedas; Cantabria; Hispanio*, indikante la elektitan pseŭdonimon por gardi la anonimecon de la aŭtoro. Por la branĉo Infanlibro oni sendu unu ekzempleron de la koncerna libro al la adreso de *Miguel Gutiérrez Adúriz* kaj tri ekzemplerojn al *Ionel Oneţ, Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando*.

Premioj: en la branĉoj *Poezio, Prozo, Teatraĵoj* kaj *Eseo*: unua premio 260 €, dua premio 182 €, tria premio 104 €; Nova Talento 182 €. En la branĉo *Infanlibro de la Jaro* 546 €. En la du subbranĉoj *Mikronoveloj* kaj *Monologoj kaj skeĉoj* po 125 €.

Noto: Kiel konstateblas, ĉi-jare eksplice konkretiĝas la ideo diversmedie manifestita de la Prezidanto kaj la Sekretario de la Belartaj Konkursoj de UEA, ke ili volas potencigi tri ĝenrojn: *mikronovelon* (mallongan rakonton), ene de la branĉo Prozo, kaj *skeĉon* kaj *monologon* (unupersonan ordinare mallongan teatraĵon), ene de la branĉo Teatraĵoj. Unue, por ke la E-beletro ne fremdu al la furoro spertata de tiuj ĝenroj kadre de etnaj literaturoj. Due, ĉar ĉi-ĝenraj kreaĵoj konsistigas materialon plej interesan kaj oportunan por ludado kuntekste de niaj kongresoj kaj renkontiĝoj. Trie, por malfermi la BK-pordojn al kiel eble plej diversa konkursantaro. Atentu tamen, ke la ĉi-jaran enkondukon de ambaŭ subbranĉoj ni faras nur prove. Ilia definitiva aligo al la BK-fakoj dependos de la reago far la BK-partoprenantoj.

Detala regularo troviĝas en la retejo de UEA. La verkoj de la Belartaj Konkursoj, premiitaj en 2017, legeblos en la volumo *Belarta rikolto 2017*, eldonota de "Mondial". La premiolistoj ekde la komenco de la Belartaj Konkursoj en 1950 troviĝas ĉi tie: <http://esperanto.net/literaturo/bk/index.html>.

Gazetaraj Komunikoj de UEA

«VI DUM LA VIVO ZORGU PRI L' ANIMO…»

La 26-an de septembro 2017 forpasis Mikaelo Giŝpling, nia elstara Esperanto-poeto. Mi plenrajte skribas «nia», ĉar Miĥail Jakovleviĉ ĉiam estis nia samlandano, kvankam ekde 1998 li loĝis en Israelo, elmigrinte kune kun siaj familianoj el Rusio. Sed li ĝis la lasta spiro restis tutanime fidela al sia patrolando. Pri tio atestas liaj versaĵoj, saturitaj de nostalgiaj rememoroj pri Rusio. Liaj pensoj kaj sentoj, esprimitaj en la poeziaĵoj, estas tre proksimaj al ni, rusianoj. Ĉiu vorto de la poeto trafas niajn korojn kaj elvokas plej emociajn reeĥojn.

Estas paradokso, ke mi la unuan (kaj, bedaŭrinde, la lastan) fojon renkontiĝis kun Miĥail Jakovleviĉ ne en Moskvo, kie ni ambaŭ loĝis paralele unu al la alia sen kruciĝo, sed en Jerusalemo. Tio okazis en aprilo de 2013, kiam mi partoprenis la 7-an Azian Esperanto-kongreson. Min kaj mian samlandaninon Tatjana Loskutova gvidis al la hejmo de la poeto niaj novaj israelaj amikoj Hanan Bordin kaj Tsvi Sadan (la lasta loĝis en la sama domo).

La vizito estis neforgesebla. Miĥail Jakovleviĉ donacis al ni librojn de siaj versaĵoj «Tie ĉi tie» kun la aŭtografoj. Reveninte al

Moskvo mi ekkorespondis kun la poeto. Liaj poeziaĵoj tiom inspiris min, ke mi komencis tradukadon de la versaĵoj, sendante ilin por pritakso al la aŭtoro. Tamen mi ne ricevis liajn tujajn aprobojn. Evidentiĝis, ke Miĥail Jakovleviĉ estas rigora redaktoro. Li kritikis ĉiun vorton en miaj tradukoj kaj proponadis siajn variantojn por apartaj verslinioj kaj strofoj. Mi eĉ ofte disputis kun li, sed nun post kelkaj jaroj, releginte liajn leterojn, mi komprenis, ke li estis prava. La laboro por mi estis ŝvitiga, ĉar mi plurfoje refaradis la tradukojn, sed li tutegale ĉiam trovadis mankojn. Li instruis min esti maksimume atentema al ĉiu vorto de la aŭtoro kaj ne enmiksadi siajn proprajn pensojn kaj sentojn, se ili ne plene kongruas kun tiuj de la originalaj verkoj. La unuajn du tradukojn (la poemoj «Jerusalemo» kaj «Lasta marŝo») mi tradukis duope kun li. Tio estis bonega «majstro-klaso» por mi. Bedaŭrinde poste mi deflankiĝis de tiu tre utila por mi kunlaboro, okupiĝinte pri aliaj aŭtoroj kaj propraj verkoj. Kaj nur post lia morto mi komprenis, kion mi perdis dum la lastaj jaroj sen komunikado kun la granda poeto-majstro.

La plej grandan parton de la proponataj nun tradukoj de la versaĵoj de Mikaelo Giŝpling mi faris dum la lasta jaro. Mi ne sukcesis sendi la tradukojn al la aŭtoro por aprobo. Do, juĝantoj pri ilia kvalito estu vi, karaj legantoj de REGo.

Ludmila Novikova (Moskvo)

VERSAĴOJ DE MIKAELO GIŜPLING
EN TRADUKOJ DE LUDMILA NOVIKOVA (2013-2017)

ДВЕ БАБОЧКИ

И день, и ночь горела лампа ярко.
В её лучистом розовом тепле
Два кокона, две жизни, два подарка
У девочки лежали на столе.

И в час урочный выползли оттуда
И закружились возле потолка
Две бабочки, две радуги, два чуда,
Два маленьких летающих цветка.

А за окном, шурша, неслись метели,
Роился снег и двери замело…
И к снежным хлопьям бабочки летели
И бились о холодное стекло.

И к вечеру застыли беспробудно,
Упав на подоконник ледяной,
Две бабочки, две радуги, два чуда,

DU PAPILIOJ

En helaj rozkoloraj varm-fluidoj
De lamp’, luminta sen malŝalta fin’,
Du pupoj, du kokonoj-krizalidoj
Kuŝadis sur tableto de knabin’.

Kaj jen post pluraj tagoj, noktoj, horoj
Ekflirtis, elrampinte el la ŝel’,
Du papilioj, du flugantaj floroj,
Du ĉielarkoj de mirakla bel’.

Trans la fenestro neĝventeg’ ululis.
Ŝtopiĝis pord’ pro l’ neĝa karusel’.
La papilioj al ĉi danco flugis,
Sed koliziis kun la vitra gel’.

Pro vana strebo al la neĝaj flokoj
Senvive falis ili en vesper’ –
Du papilioj, ĉielarkoj, floroj,

Обманутых поддельною весной.

Ты плачешь, девочка… Не надо,
друг, не надо…
Мы тоже умираем на лету.
А красота – нелёгкая награда:
Всей жизнью платим мы за красоту.

Trompitaj de la falsa primaver'.

Vi ploras, knabinet'... Ho, ĉesu,
povrulino...
Ni ankaŭ ofte mortas pro flugem'.
Belecon donas por turment' destino,
Por bel' ni pagas per la vivo mem.

1973 (el arkivo de Vladimir Samodaj)

traduko el la rusa
de Ludmila Novikova (2013)

LASTA MARŜO

Al William Auld

Cimbaloj kaj tambur' per siaj ritmaj
batoj
Kaj voĉoj de trumpet', fagoto
kaj trombon'
Bravure vokas nin, kaj marŝas
la soldatoj
El lasta ofensiv', el lasta bastion'.

Ni marŝas en mallum', en horoj
tre malfruaj,
Kun juna leŭtenant', kun
olda kaporal'.
Ne frapas sur pavim' botegoj niaj
bruaj,
Ne pendas ĉe la man' grenadoj kaj
mitral'.
Soldato post soldat'... Nekalkuleblaj
nombroj...
Ni luktis por patri', ni falis por
liber'…
Kaj marŝas al ĉiel' senkorpaj niaj
ombroj,
Dum niaj korpoj nun sterniĝas sur
la ter'.
Ĉi tie, en nebul', ne tondras jam
atakoj.
Por ni ne restis plu sufero kaj dolor'...

ПОСЛЕДНИЙ МАРШ

Уильяму Олду

Не слышно взрывов мин, умолкли
автоматы,
Бравурный марш играют труба, фагот,
тромбон.
Шагаем строем мы, погибшие солдаты,
Под барабанный бой, тарелок
медных звон.

Ведут нас в темноте, в часы
глубокой ночи,
Немолодой капрал и юный лейтенант.
Но наши сапоги в такт маршу
не грохочут,
И нет уж под рукой ни ружей,
ни гранат.
Идём в колонне мы заученным
движеньем.
Мы бились за страну, и гибель –
наш удел.
Уходим в небо мы, бесплотные виденья,
Оставив на земле останки наших тел.

Здесь, в облаках, светло, здесь ждёт
покой и воля,
От грохота боёв не треснет голова.
Мы корчились внизу от ужаса и боли.
И что посмертно нам?
Хвалебные слова!

Senspire svenis ni sen gamboj kaj
sen brakoj...
Ho, kia rekompenc' – postmorta
nia glor'!

Kaj se ne murdis tuj eksplodo
de obuso,
Nin trafis nia sort' sur lazareta lit'...
Kaj ŝvelas pli kaj pli de sango kaj
de puso
La granda kota vind' – standardo
de milit'.

Predikas oni nun de tronoj kaj
ambonoj,
Ke dolĉa estas mort' por sia patra
land'...
Sed kial devas ni nur pere de kanono
Paroli inter si kaj morti laŭ komand'?

Kaj ree super kap' la fajra vento
blovas,
Kaj ree akra ŝtal' nin ĵetas el la sel'...
Pro kio sur la ter' kunvivi ni
ne povas?
Pro kio regas pac' nur ie en ĉiel'?

Do marŝu en la vic', aŭskultu
la orkestron,
La zorgoj estas for – do ĝoju pri
l' destin'!
Senfina nia ĉen' foriras en neeston:
Eterna kantonment' akceptos
baldaŭ nin.

Jen nova eskadron' kun brava
kapitano,
Jen nova regiment', falinta
ĉe fortres'...
Kaj sonoj de la marŝ' degelas
en lontano,
Kaj dronas la anim' en maro

А если Бог не даст нам смерти
без мучений,
То ждёт нас лазарет, где ночи
так длинны.
Из наших рваных ран напьётся
нагноений
Большой вонючий бинт – кровавый
стяг войны.

Вещают нынче все, кто с трона,
кто в газетах,
Что так почётна смерть за родину свою.
Но почему должны мы вместо слов
ракеты
Друг другу посылать и погибать в бою?

И вновь над головой вихрь огневой
кружится,
И вновь простой солдат поверженный
лежит…
Ну почему нельзя нам на земле
ужиться?
Ну почему лишь там, на небе,
мир царит?

И снова марша ритм нам барабан
выводит.
Так маршируй бодрей и радуйся,
солдат!
Наш бесконечный строй в небытие
уходит,
И ждёт нас на постой верховный
интендант.

Вот новый батальон
с героем-капитаном
Полёг при штурме где-то, живого
не щадя…
И тает вдалеке звук ритма барабана,
И души павших тонут во мгле небытия.

de forges'...

1994 (el la libro «Eola harpo»,1999)

перевод с эсперанто М. Гишплинга и Л. Новиковой (2013)

JERUSALEMO

La tagiĝo venas ŝtele per piedoj molaj, kataj,
Kaj heroldas birda kanto ĉe l' fenestro la alvenon…
Blankaj domoj, blankaj muroj rozkolore delikataj
Riveliĝas el krepusko, renkontante la matenon.
Ĉe l' dentvica horizonto estingiĝas lasta stelo,
Sur la freŝa foliaro jam ekludas luma trem',
Kaj grimpante sur montetojn levas sin al la ĉielo
Ĉiam juna kaj eterna sankta urb' Jerusalem'.

Tra l' moderna brua vivo, tra asfalto kaj betono
Mi konstante sentas spiron de aliaj foraj tempoj…
Kaj mi vagas, kara urbo, sur antikvaj viaj ŝtonoj,
Inter viaj monaĥejoj, sinagogoj, turoj, temploj.
Do mutiĝu mia lango, do sekiĝu miaj manoj,
Se mi vin forgesos iam – ĉu en ĝojo, ĉu sub prem'…
Mi ripetas la formulon de la disaj samgentanoj:
Estu mi la sekvan jaron en la urb' Jerusalem'!

1996 (el la libro "Eola harpo", 1999)

ИЕРУСАЛИМ

Утро медленно, но верно вытесняет ночь за горы,
И все птицы многогласно возвещают это пеньем…
Дымкой розовой подёрнут, выплывает белый город
Из предутренних потёмок к новодневному явленью.
За зубцами горизонта звёзды канули в безвестье.
Яркий луч скользит по кронам переливом росяным.
И взбирается по склонам, устремляясь в поднебесье,
Очень древний, очень юный вечный Иерусалим.

Сквозь сегодняшнюю сумять, сквозь асфальт и блеск витринный
Я дыханье ощущаю тех времён – истоков наших.
И брожу я, милый город, по камням твоим старинным,
Меж твоих церквей и храмов, синагог, мечетей, башен.
Пусть язык мой онемеет, пусть мои отсохнут руки,
Если я тебя забуду, по краям бродя чужим…
И твержу я пожеланье соплеменников в разлуке:
"Через год в Святой столице!" Жди нас, Иерусалим!

перевод с эсперанто Л. Новиковой (с участием автора), 2013

DU NOMOJ

Mi rusan lingvon por kontakto
Ensuĉis kun patrina lakto.
Sed krome volis la destin',
Ke inter vagoj multejaraj
Du lingvoj tre neordinaraj
Sur mia voj' atendis min.

Du lingvoj, kies karaj sonoj
Naskiĝis dank' al du personoj,
Dank' al ilia mensa pov'...
Du nomojn vidas mi apudaj –
De Eliezer Ben Jehuda
Kaj Eliezer Zamenhof.

Du samaj nomoj, sama vervo,
Kaj sama streb' al nobla servo,
Kaj samaj jaroj, sama sort',
Kaj samaj mokoj kaj forpuŝoj,
Kaj sama cel': al mutaj buŝoj
Alvenu unuiga Vort'!

Ĉi tiuj du idealistoj
Dum noktoj sidis ĉe vortlistoj,
Por ke foriĝu lingva bar',
Kaj agis kun persisto krea –
L' unua por la gent' hebrea,
La dua eĉ por la homar'.

Du lingvoj por la uz' komuna
Aperis en la vivo nuna
Post la abnegacia pen':
La lingvo sankta kaj antikva
Kaj Esperanto – stat-ha-tikva[1] –
La bonaj iloj de kompren'.

Kaj spite al disec' altruda
Nun lumas en la mondo kruda
La bona nom', ha-ŝem ha-tov[1]

ДВА ИМЕНИ

Язык «великий и могучий»[2]
Мной от рождения получен.
Но так задумано судьбой,
Что на дорогах жизни дальних
Два языка оригинальных,
Не расставаясь, шли со мной.

Два языка – души созвучье,
Плод силы творческой, кипучей,
Двух гениальнейших умов,
Что создали два этих чуда:
Один – Элиэзер Бен-Йехуда,
Другой – Элиэзер Заменгоф.

Два тёзки общих поколений.
Из благородных побуждений
В них общий замысел возник.
И те же клейма сумасбродов,
И та же цель – в уста народов
Вложить сплочения язык!

Идеалисты эти оба
Корпели над трудом до гроба,
Все тяготы судьбы снесли,
Чтоб пали языков барьеры.
Один – для племени Евера[3],
Другой – для всех людей Земли.

Два языка для общей цели
Возникли в чудной параллели.
Не стали тщетными труды.
Один – старинный lingvo sankta[4]
И stat-ha-tikva эсперанто –
Для понимания мосты.

В жестоком современном веке
Сияют две звезды навеки:
La bona nom'[5], ha-ŝem ha-tov

---

[1] stat-ha-tikva (hebree, на иврите) – lingvo de espero (pri Esperanto), язык надежды (об эсперанто)

Du nomoj el la gento juda –
De Eliezer Ben-Jehuda,
De Eliezer Zamenhof.

Потомков племени Иуды:
Один – Элиэзер Бен-Йехуда,
Другой – Элиэзер Заменгоф.

1998 (el la libro «Tie ĉi tie», 2003)

FORFLUGO

La motoroj ekmuĝis… La avio
ekkuris kun bruo,
Akcelante la kuron laŭ sternita betona
rubando,
Kaj en iu momento al ĉielo turniĝis
la pruo –
Ni ekflugis, ni jam deŝiriĝis
de l' neĝa Ruslando.

Deŝiriĝis de l' tero, kie ni
en la mondon alvenis,
Kie longe ni vivis, kaj kun kiu ni
plagojn trapasis,
Kiun forte ni amis, kiu tamen
la amon venenis,
Kaj mensogis al ni kaj
la lastan esperon frakasis.

Sed post ni tie restas karaj tomboj kaj
koraj amikoj...
Al la nest' forlasita min alligas
multjara kutimo...
Kaj fantoma doloro de la ĵus
disŝiritaj radikoj
Ronĝas min kaj ĝis nun sangas
stumpo de mia animo.

1999 (el la libro «Tie ĉi tie», 2003)

ОТЛЁТ

Вот моторы взревели… Самолёт
побежал по бетону,
Ускоряя разбежку, сотрясаясь
на стойках шасси и…
Наступила секунда, когда с заданным
курсом наклона
Мы взлетели уже, оторвавшись
от снежной России.

От земли оторвались, на которой на свет
мы явились,
На которой мы жили и с которой делили
все беды.
Мы её так любили, но взаимной любви
не добились,
И она нам лгала, не прислушавшись
к нашему кредо.

После нас там остались дорогие друзья
и могилы…
И к родному гнездовью возвращаться
из нас каждый хочет…
Вновь и вновь боль разрыва всех корней
с нашей родиной милой
Всё терзает меня, и как прежде душа
кровоточит.

---

[1] ha-ŝem ha-tov (hebree, на иврите) – bona nomo, хорошее имя
[2] Перифраз на основе стихотворения в прозе «Русский язык» И.С. Тургенева
[3] Евер – библейский персонаж, предок израильтян
[4] lingvo sankta (на эсперанто) – священный язык (об иврите)
[5] bona nom' (на эсперанто) – хорошее имя

AL MIA TABLO

Mi, kiel multaj, skribis “en la tablon”:
Nin iam kutimigis la reĝim’
Silenti kaj la kriojn de l’ anim’
Enmeti en la provizoran staplon.

Mi longe plenigadis la tirkeston.
Pogute kreskis mia dosier’ –
Kaj fine mi transportis mian eston
Sur la ĉifitan stakon da paper’.

Mi estas tie – en la kest’ el ligno,
En la kantitaj iam sub sordin’
Pasioj miaj, kiuj movis min –
Malamo, ĝojo, amo kaj indigno…

Konfidenculo, mia skribotablo –
Amiko kaj gardanto de sekret’,
Mi dankas vin elkore pro l’ kapablo
Konservi la animon de poet’
Vivinta inter dio kaj diablo.

1999 (el la libro «Tie ĉi tie», 2003)

МОЕМУ СТОЛУ

Как многие, я «в стол» писал когда-то:
То был режим, который нас душил
И приучал терзания души
Скрывать из опасенья компромата.

Своё «досье» я заполнял годами,
По капле собирая душу в стол,
Перенеся страдания ночами
На стопку перечёрканных листов.

И весь я там – в том ящике старинном,
Во всём, что прежде волновало кровь:
Презренье, гнев, надежда и любовь,
Звучавшие когда-то под сурдину…

Мой стол, с кем я общался диалогом,
Мой лучший друг, мой верный конфидент,
Спасибо, брат, что у тебя под боком
Мог сохранить порыв души поэт,
Живущий между дьяволом и богом.

SOMERA TENDARO

Ni iris duope tra hortoj.
Ŝi flue babilis sen ĉes’,
Sed mankis… ĉu vortoj?.. ĉu fortoj?..
Al mi post la kurso de Ĉseh.

Ni venis finfine al lago
Kaj tie eksidis ĉe l’ bord’
Sub granda... ĉu fabo?.. ĉu fago?..
Ripozi en plena komfort’.

Silento... Kvieto... Varmego...
La bordo, kovrita de junk’...
Nur iu... ĉu pigo?.. ĉu pego?..
Martelas foj-foje sur trunk’.

В ЛЕТНЕМ ЭСПЕРАНТО-ЛАГЕРЕ

Мы шли с ней вдвоём. Но с комфортом
Болталось лишь ей, но не мне.
Ведь где взять… то ль *vortoj*?.. то ль *fortoj*?..
Мне, с курса по методу Че?

Пришли, наконец, мы к оврагу,
Без сил уж себя волоча.
Под деревом… *fabo*?.. иль *fago*?..
Мы сели на берег ручья.

Покой… Запах елей… И нега,
Блаженство прохлады в жару…
Лишь слышно, как… *pigo*?.. иль *pego*?..
Стучит временами в бору.

Rigardu: jen staras upupo, –
Mi montris al la kunulin'. –
Sub tiu... ĉu nubo?.. ĉu pubo?..
Tre bele aspektas la pin'...

Sed ŝin ne allogis la belo
De nia matura somer'...
Ŝi kiel... ĉu mevo?.. ĉu melo?..
Ekflirtis al pli alta sfer':

Al temoj nur filozofiaj –
Pri dio, pri mondharmoni...
Sed pensoj... ĉu piaj?.. ĉu fiaj?..
Turniĝis en mia krani'.

La vortoj pri saĝaj principoj
Torentis kaj daŭris sen fin',
Sed ŝiaj... ĉu lipoj?.. ĉu zipoj?..
Pli forte efikis sur min.

Kaj mi post singardaj ektuŝoj
Altiris ŝin je la ĉemiz',
Kaj niaj... ĉu guŝoj?.. ĉu buŝoj?..
Subite kuniĝis en kis'.

Kun iom nebulaj okuloj
Ni tuj liberiĝis de l' vest',
Kaj vane... ĉu puloj?.. ĉu kuloj?..
Nin mordis dum nia kunest'.

Ni kuŝis en longa langvoro...
Kaj kriis senhejma kukol',
Kaj flugis... ĉu horo?.. ĉu koro?..
Sub tiu ĉi blua kupol'.

Kun flamaj mentonoj kaj vangoj
Ekiris ni plu en silent'…
Ne taŭgas... ĉu lingvoj?.. ĉu langoj?..
Por diri pri tia event'.

2000 (el la libro «Tie ĉi tie», 2003)

Смотри: вот что глазу так любо, –
Сказал я. Взглянула она. –
Под этим… то ль *nubo*?.. то ль *pubo*?..
Стоит живописно сосна…

Красоты тех сосен и елей
Её не прельстили совсем…
Она, словно… *mevo*?.. иль *melo*?..
Ушла в мир заоблачных тем.

Гармония мира… Россия…
О боге… И о войне…
Но мысль… то ли *pia*?.. то ль *fia*?..
Крутилась всё время во мне.

Слова нескончаемой кипой
Всё сыпались, смыслом маня.
Её… то ли *lipoj*?.. то ль *zipoj*?..
Сильнее манили меня.

И я уже больше не слушал,
Со страстью прижал её враз,
И наши… то ль *guŝoj*?.. то ль *buŝoj*?..
Слились в поцелуе тотчас.

Со скоростью пущенной пули
Мы скинули всё с наших тел,
Напрасно… то ль *kuloj*?.. то ль *puloj*?..
Терзали нас с яростью стрел…

Лежали мы в неге нескорой…
Кукушке кричать стало лень,
Парили то ль… *horoj*?.. то ль *koroj*?..
Под куполом синим в тот день.

Со взглядом, подёрнутым влагой,
Пошли мы язык изучать…
Но могут ли… *lingvoj*?.. иль *langoj*?..
О счастье любви рассказать?

MI ESTAS JUDO KAJ SAMTEMPE RUSO…

Mi estas judo kaj samtempe ruso –
Laŭ la deveno, trajtoj kaj eduko.
Mi ĉiam vivis inter du polusoj,
En mi cirkulas kunmiksita suko.
Kaj estas mi pro tiu ĉi koktelo
Markita ĉiam per sespinta stelo.

Mi prenis ion de judeaj montoj
Kaj el praavoj el la fora sudo,
Sed pleje min trinkigis rusaj fontoj –
Mi estas ruso eble pli ol judo...
Sed la judeco estas peza ŝarĝo
Portata ĉie kaj en ĉiu aĝo.

Kaj ĉiam staras antaŭ mia sojlo
La mondo infektita je virusoj
De la naciaj hato kaj orgojlo…
Ni povas esti judoj, francoj, rusoj –
Ekzistas multe da naciaj nomoj –
Sed antaŭ ĉio ni ja estas homoj!

Ni estas homoj, egalrajtaj homoj.
Neniam estos mi indiferenta
Por la masakroj, mokoj kaj pogromoj
Kaŭzitaj de l' malamo intergenta,
Kaj dum plu daŭras tiu sanga ludo,
Mi malgraŭ ĉio volas esti judo!

2000 (el la libro «Tie ĉi tie», 2003)

ЕВРЕЙ Я, НО И РУССКИЙ В ТО ЖЕ ВРЕМЯ…

Еврей я, но и русский в то же время –
Происхожденьем, духом, воспитаньем.
Меня взрастили то и это племя,
Во мне коктейль – тех двух кровей слиянье.
И эта смесь помечена судьбою
Навек шестиконечною звездою.

Я что-то взял от южного народа,
От предков из далёкой Иудеи,
Но из колодцев русских пил я воду –
И что мне ближе – русскому еврею?..
Печать еврея – тягостное бремя,
Носимое везде, в любое время.

Тебя повсюду в городах и весях
Встречают как чужого иноземца,
С национальной ненавистью, спесью…
Ты можешь быть евреем, русским, немцем –
Названий наций много на планете,
Но прежде – человечества мы дети!

Мы все равны от самого рожденья.
Я никогда, нигде не позабуду
Погромов и насмешек униженья
На почве мнимого родства с Иудой.
Пока не сгинет эта ахинея,
Я буду называть себя евреем!

TIE ĈI TIE

La vojoj estas glitaj… Jen problemo!
La ĝibaj stratoj de Jerusalemo
Ekbrilis nun per nekutima blanko…
Tre longe ni pri pluvo sendis preĝon –
Anstataŭ pluvo ni ricevis neĝon.
Ĝis nun mi vidis ĝin nur en fridŝranko.

ТУТ НЕ ТУТ

Как скользко на дорогах… Нестерпимо!
Горбины улиц Иерусалима
Вдруг заблестели в белоснежном виде.
Давно мы о дожде молили бога,
Но вымолили снега лишь немного.

Sed en Rusland’, en dika neĝmasivo
Trapasis mi duonon de la vivo.
Kaj tie post somera sent-orgio
Kaj post aŭtuno kun la ŝlim’ kaj muko
La teron fine kovris blanka tuko
Kaj komenciĝis vintra letargio.

Sed ni, de l’ frost’ viktimoj kaj ostaĝoj,
Atendis ĝin, ĉar estis avantaĝoj
En tiu ĉi sezono plej severa:
En neĝa val’, sur sino de l’ naturo
Allogis nin la ĉarma skia kuro
Kaj skiis ni eĉ dum krepusk’ vespera.

Ĉe ĉia arbo kreskis neĝa duno
Kaj nekredeble granda plena luno
Malalte pendis kiel flava lampo –
En ĝia lum’ mistera kaj fantoma
Ni vigle kuris en la mond’ senhoma
Tra sombra bosk’ kaj sur dezerta kampo.

Ni tiam spertis ĝojon de libero.
Ni kvazaŭ flugis super neĝa tero.
La skioj ritme klakis kaj susuris
Kaj nin fascinis nia sorĉa flugo…
Sen teda brido kaj sen peza jugo
Ni en lontanon kuris, kuris, kuris…

Sur ĝibaj stratoj de Jerusalemo
Pro kio min ekkaptis la revemo?
La neĝo post kvin horoj jam ne blankas,
Sur la pavimoj svagaj rojoj fluas,
La palmoj verdas kaj floretoj bluas…
Sed kial do al mi la neĝo mankas ?..

2000 (el la libro «Tie ĉi tie», 2003)

Я снег здесь только в морозилке видел.

Но вот в России, дорогой отчизне,
Провёл в снегах я половину жизни.
Там после майско-летнего раздолья,
После осенней сырости и грязи
Земля вдруг покрывалась белой бязью,
И наступало зимнее засонье.

Но мы, детишки, так мороза ждали,
Без страха всякого его желали
В этот сезон суровый очень-очень.
Среди снегов, на ледяной поляне
Нас ожидало на коньках катанье,
И радостно катались мы до ночи.

Деревья вязли в куче бело-дюнной,
И преогромный блин – диск полнолунный –
Висел так низко – лампой с абажуром.
В сиянии, таинственно манящем,
Мы бегали в пространстве леденящем,
В лесном кольце, заснеженном и хмуром.

Мы ощущали полную свободу,
Как будто мы – пилоты от природы.
Коньки звенели в ритме и шуршали,
И мы, в восторге от того полёта,
Без тяжких пут, без жизненного гнёта,
Без устали бежали и бежали…

Зачем на горках Иерусалима
Я вспоминаю русские те зимы?
Здесь через час нежданный снег растает.
Ручьи уже бегут по тротуарам.
Цветы и пальмы заблестят муаром…
Так почему ж мне снега не хватает?

EŬGENO MIĤALSKI

Zelot', esperanta poeto
Kun revolucia agordo,
Li flugis en kuna impeto
Al nova pli justa mondordo.

Li pensis, ke stagno minacas
Al nia malsana socio,
Li kredis, ke fajro kuracas,
Ke helpas nur operacio.

Sorĉita de nova fetiĉo
Li sekvis sincere la kredon,
Ke sur nia voj' al feliĉo
La celo pravigas rimedon.

De l' drasta epok' najtingalo,
Li vokis proletojn de l' Tero
Al venko en klasa batalo,
Al regno de ĝoj' kaj libero.

Li agis kun abnegacio...
Sed kial neniu memoras,
Ke ĉiam la Revolucio
La proprajn infanojn devoras?

Post revoj kaj post idilioj
Ekbrulis teror' kaj malamo...
Flugintaj al lum' papilioj
Pereis en tiu ĉi flamo.

Kaj li estis inter la multaj
Kaptitaj de l' ŝtalaj makzeloj,
Naivaj, fidelaj, senkulpaj,
Pafitaj dum noktoj en keloj.

Mi, ido de l' temp' senkompata,
Memoras la pezan etapon
Kaj antaŭ la tomb' nesciata
Mi klinas silente la kapon.

ЕВГЕНИЙ МИХАЛЬСКИЙ

Поэт и адепт эсперанто
С революционною лирой,
Он в общей толпе протестантов
Спешил к справедливому миру.

Ступив под багровое знамя,
Поверив в благие призывы,
Он думал, что лечит лишь пламя,
Как скальпель хирурга нарывы.

И он, вдохновлённый участьем
В борьбе с мировым мироедством,
Считал, что для общего счастья
Оправданы целью все средства.

Певец взбунтовавшейся массы,
Он звал пролетариев всюду
К победе в сражении классов
За царство рабочего люда.

Он действовал с искренним пылом…
Но ведь Революция злая,
О чём почему-то забыл он,
Своих же детей пожирает.

И после иллюзии планов
Террор наступил, словно кара…
И все мотыльки-пироманы
Сгорели во чреве пожара.

И он был одним среди многих
Зажатых стальными зубами,
Безвинно страдавших в остроге,
Расстрелянных тайно ночами.

Дитя той эпохи жестокой,
Я, помнящий ужас этапа,
У братской могилы далёкой
Снимаю в молчании шляпу.

2001 (el la libro «Tie ĉi tie», 2003)

LA TUTA VIVO – DE LULIL'…

La tuta vivo – de lulil'
Ĝis sarkofago –
Rapide pasas for, simil'
Al unu tago.

Ekiras ni, dum la ĉiel'
Logante ruĝas…
La vivo al lontana cel'
Nin ĉiam urĝas...

Kaj ni por lukto kaj labor'
Manikojn kuspas,
Sed horo flugas post la hor' –
Jen jam krepuskas.

Finiĝis hasta brua tag'
De la foiro,
Ni devas halti sur bivak'
Ĉe sunsubiro.

Kun trist', kaj milda ironi'
Kaj kordoloroj
La saman vojon paŝas ni
En rememoroj.

Ĉe l' horizonto fajra spur'
Forvelkas svene.
Kaj ni degelas en obskur'
Jam senrevene.

ВСЯ НАША ЖИЗНЬ – ОДИН МОМЕНТ…

Вся наша жизнь – один момент,
Лишь день от силы.
Ты не успел увидеть свет –
Уже могила.

Нас утром тёмный небосвод
Рассветом встретит,
И жизни дальний горизонт
Приветно светит.

К борьбе, к трудам торопит нас,
Надеждой греет…
Но вот летит за часом час –
Уже темнеет.

Дневной пробег вошёл в финал,
Навстречу тризне,
И ждёт нас тягостный привал
На склоне жизни.

Чтобы утешить как-нибудь
Души терзанья,
Мы повторяем весь свой путь
В воспоминаньях.

Уж тает алая черта
У горизонта.
Нас поглощает темнота
Без разворота.

2001 (el la libro «Tie ĉi tie», 2003)

SENDORMO

Ju pli foriĝas vi, des pli sopiro ronĝas
Kaj nokte vi aperas, amatin':
Mi rememoras vin, mi vin konstante
Sed via bild' ne anstataŭas vin!

БЕССОННИЦА

Чем дальше от меня ты, тем душе
больнее.
Любимая, со мною ты во сне.
И я люблю тебя сильнее и сильнее,
Но сон твой облик не заменит мне!

Apenaŭ ŝprucas lum', tra svarmoj
kaj tra skuoj
Ektrenas min torento de la viv'
Kaj ombre pasas vi post ĉiutagaj bruoj
Simile al dampita gvidmotiv'.

Sed kiam tondra tag' kliniĝas
al malsupro,
La marŝo cedas al minora ton':
Silentas jam tambur', ne plu sonoras
kupro
Kaj sole kantas via violon'.

2001 (el la libro «Tie ĉi tie», 2003)

Едва забрезжит свет, в потоке
шумных танцев
Несёт меня судьбы локомотив.
И тенью ты скользишь сквозь
эти диссонансы,
Как будто приглушённый лейтмотив.

Но только грохот дня склоняется
к финалу,
Бравурный марш не слышится уже.
Смолкают барабан и медные кимвалы.
Лишь твоей скрипки плач звучит
в душе.

RUĜAJ SKADROJ DE RUSIO

La ruĝa fajro de l' Revolucio!..
La kruda rompo de moralaj kadroj,
Frenezo, plena perdo de racio
Kaj fulmaj rajdoj de sovaĝaj skadroj...

La galopantaj miloj da centaŭroj
Sur kampoj, dispremitaj de la hufoj,
Ruinoj, incendioj kaj kadavroj –
La stranga vivo, kiun regas blufoj...

La urboj, kie rampas fum' milita,
Malsataj beboj, ploro de virino...
La povra ter', abunde priverŝita
Per sango, larmoj, ŝvito kaj urino...

Sed super ĉio belas la Naturo
Kaj kiel ĉiam fluas ĝia graco –
La sun' karesas, verdas la veluro
De freŝa herbo, brilas la lazuro...
Nur mankas paco... Simpla
homa paco...

2001 (el la libro «Tie ĉi tie», 2003)

КРАСНЫЕ ЭСКАДРОНЫ РОССИИ

Той Революции кровавый отсвет!..
Свержение моральных всех канонов,
Безумье полное и дикий посвист
Несущихся полями эскадронов…

Принёс галоп взбесившихся кентавров
По нивам, искалеченным без меры,
Руины, трупы, голод, дым пожаров –
Вот жизнь, которой правят лишь
химеры…

Разруха в русских городах, селеньях,
Вой нищих вдов, охваченных бедою…
Земля, залитая до омерзенья
Слезами, кровью, потом и мочою…

Но над всем этим – благодать
Природы,
Ниспосланная струями зефира –
Ласкает солнце, прохлаждают воды,
Велюром нежным зеленеют всходы…
Но нет лишь мира… Нет простого
мира…

LA SIMPLAJ RIMOJ

Se mi mian vivon de l' komenc' ripetus,
Kion do mi tiam de la Sorto petus?

Donu pacan hejmon, sanon kaj laboron
Tian, kia povus logi mian koron.

Donu varman amon inter du animoj
Samsonantaj, kiel vortoj en la rimoj.

Donu en la vivo iom da feliĉo –
Ĝojon kaj bonstaton sen la granda riĉo.

Lasu nin restadi en amika rondo,
Por ke ni ne estu solaj en la mondo.

Por infanoj niaj lasu sunon brili,
Kaj komprenon donu inter ni kaj ili.

Sed precipe donu – petus mi la Sorton –
Ne facilan vivon, sed facilan morton.

2002 (el la libro «Tie ĉi tie», 2003)

ПРОСТЫЕ РИФМЫ

Если б можно было жизнь прожить с начала,
У Судьбы тогда бы я просил о малом.

Дай мне мира в доме, силы и работу,
Ту, что вызывала б интерес, охоту.

Дай созвучье ритма двух сердец влюблённых,
Как двух слов в поэме, рифмой обручённых.

Дай мне в моей жизни счастья небольшого –
Радости, достатка без богатства злого.

Круг друзей пусть будет более широким,
Чтоб я не остался в мире одиноким.

Солнце для потомков пусть всё так же светит,
Чтобы гармонично жили мы и дети.

Попрошу отдельно – сверх всех благ на свете –
Мне не лёгкой жизни, только лёгкой смерти.

HAMLETO

Ho, povra Jorik! De-sur mia polmo
Kranio via fiksrigardas min.
Vi estis homo. Nun vi estas polvo.
Ni ĉiuj venas al la sama fin'.
Tombisto gaja apud tomborando
Vidinte min eksidis por ripoz'
Kaj inter bonaj glutoj da grenbrando
Filozofias pri metamorfoz':

ГАМЛЕТ

О, бедный Йорик! С кончика лопаты
Твой череп смотрит тьмой из-подо лба.
Ты человеком был. Теперь – труха ты.
И всех нас ждёт такая же судьба.
Могильщик-балагур на край могилы,
Меня увидев, сел, где был и я,
И меж глотками эликсира силы

«En longa ĉen’ de naskoj kaj ekstermoj
Tombisto estas grava element’ –
Li fosas kavon, plu laboras vermoj
Kaj kun la ter’ miksiĝas la klient’.
Kaj vin kaj min englutos la mallumo.
Ne helpos jam doktor’ nek eliksir’.
Vi estas homo, sed vi estos humo…
Do kion fari, mia kara Sir’?
Mi vin atendos ĉe la lasta limo,
Do vivu ĝoje ĝis vin trafos morb’...
Vi dum la vivo zorgu pri l’ animo,
Post via mort’ mi zorgos pri la korp’».
Kaj moke sonas lia raŭka voĉo,
Kaj ŝprucas ter’ sub batoj de l’ pioĉo.

2003 (el la libro “Tie ĉi tie”, 2003)

Стал рассуждать о смысле бытия:
«В рождений и смертей кипящем рое
Могильщик – очень важный элемент:
Копает яму, после черви роют,
И вот с землёй мешается клиент.
И вы, и я – все станем этим комом.
Ни доктор не спасёт, ни Люцифер.
Ты – человек, а станешь чернозёмом…
И что же делать, мой любезный сэр?
Ещё не оказались у черты вы,
Так радуйтесь, пока не грянет гром…
Заботьтесь о душе, пока вы живы,
О теле позабочусь я потом».
И покатились хохота раскаты,
Земля взметнулась от рывка лопаты.

ASSOL

Fridaj larmoj de longa aŭtuno,
Monotono de tagoj-ĝemeloj...
Ĉio tedis – paseo kaj nuno,
Vi rifuĝas en mond’ de fabeloj.

Vi sopiras. La vivo mallevas
En rutinon de kota provinco.
Sed ĝis nun vi esperas kaj revas,
Ke alvenos al vi bela princo.

Li aperos, la princ’ atendata –
Nobla hom’, kapitano kaj dando.
Blanka brigo sub veloj skarlataj
Vin forportos al ĝoja Mirlando.

Pasas jaro senŝanĝe post jaro,
Kaj vin helpas nur unu konsol’:
Vi dum horoj rigardas al maro,
Vi atendas, vi kredas, Assol!

2006 (el la libro “Vespere”, 2008)

АССОЛЬ

Осень плачет дождём монотонным,
Череда дней холодных, ненастных
Угнетает унынием сонным…
И уходишь ты в мир грёз прекрасных.

Ты тоскуешь. Ты в скромной одежде,
Край родной – далеко не столица.
Всё равно ты мечтаешь, как прежде,
О приходе прекрасного принца.

Он придёт, этот принц запоздалый,
Капитан – благороден и ярок.
Бригантина под парусом алым
Унесёт вас в страну твоих сказок.

Год за годом проходят, и вскоре
Тронут сердце сомненья и боль.
Но ты смотришь часами на море,
Ждёшь его – своё счастье, Ассоль!

Estante ĉiam memkritikema kaj senkompata al mi mem, mi ne kuraĝas opinii speciale gravaj miajn ruslingvajn verso-eksperimentojn. Sed ene de la lastaj du jaroj estis almenaŭ tri okazoj, ke mi levu la nazon ĉi-direkte. La unuan organizis Viktoro Aroloviĉ, rekomendinte min al la gvidanto de prezentadoj de poetoj-humuristoj en Moskvo. La duan aranĝis estrino de unu el tiĥvinaj bibliotekoj, admoninte min partopreni regionan konkurson de bardaj kantoj. Ĉi-jare, en oktobro, estis la tria okazo. Mia bona amiko, bardo Georgo Handzlik rekomendis min al la organizanto de festivalo de slava poezio. Organizata ĉiujare, ĝi okazis jam la kvinan fojon en Silezio kun partopreno de ĉ. 30 slavaj poetoj el 6 landoj. Al la organizanto plaĉis tradukoj de kelkaj miaj versetoj en la polan (faris Georgo), do mi estis invitita kaj eksteratende bone akceptita en ĉiuj urboj, kie okazis la poeziaj prezentaĵoj enkadre de la festivala programo.

Dum miaj deklamadoj mi konkludis, ke la plej bonan akcepton rikoltis la poemetoj, aŭtore tradukitaj el Esperanto. Tiu okupo logas min dum la lastaj dek aŭ dek kvin jaroj; foje mi faris tion laŭ mendo de amikoj, alifoje – propravole. Rezultas tamen, ke plej ofte la traduko iamaniere iras for de la originalaj versoj, konservante nur la ideon, foje eĉ nur parton de la ideo, kaj tiel iĝante memstara poemo. Kiel kaj kial tio okazas? Mi ne kapablas klarigi, do mi simple prezentas ĉi tie kelkajn ekzemplojn de mia laboro. Eble iu sufloros...

Mikaelo Bronŝtejn (Tiĥvin)

Melankolia aĝo

Finiĝas nia somero,
aŭtuno akceptas nin, do,
unua flavo en verdo –
afero mirinda.
Jam logas ĉetabla sido
pli ol amikronda staro.
Jam foje mankas memfido
por gaja gitaro.

Melankolia aĝo,
kvietiĝanta flamo...

Шестьдесят восемь

За синей горою где-то
до лета уснуло лето,
а листьев жар с сединою
остался со мною.
И век не поднять, так грустно,
и ветер унылый плачет.
Я знаю, так надо, пусть, но
хотелось иначе.

Неровно дышит пламя,
швыряя краски в осень,

Nur same nin turmentas
libero kaj amo.

Libero postulas vojon,
la amon amo aspiras –
ĉe l' fin' de nia somero
ni tamen foiras.
Ankoraŭ tendaraj fajroj
en niaj okuloj lumas,
ankoraŭ inoj kaj revoj
nin ofte brakumas.

Aŭtun', amatino mia,
benata kaj multkolora!
La aĝo melankolia
ne estu angora.
Aŭtun', viaj vokaj ventoj
en for' antaŭ mi koboldas...
Finiĝas nia somero,
sed sentoj ne oldas.

1991

а в кронах, над стволами –
мои шестьдесят восемь.

Здесь бронза дубов смешалась
с кленовою красной медью,
здесь всё, что во мне решалось,
закончено – ведь я,
седлая лихое время,
закидывал ногу в стремя
и мчался вперед беспечно,
а время – конечно.

Но не видать мне леса
за вереницей сосен.
В ребре гоняют беса
мои шестьдесят восемь.

Ах, осень, кокетка, ведьма,
ужель мне не дашь покоя?
Так будь осторожней, ведь мы
устроим такое!
Мы оба – шальные дети,
мы пляшем, не сходим с круга,
и новую зиму встретим
в объятьях друг друга.

И снова ногу – в стремя,
и становлюсь несносен,
но мне плевать на бремя –
мои шестьдесят восемь.

2017

Polonezo

Super ĉiutaga pezo,
super vivrutino ŝajna
levis min la polonezo,
savis min la polonezo
dum la ĝua nokt' jarŝanĝa...

Pompaj paroj, pimpaj paŝoj
en memfido melodia.

Полонез

Возвышая над рутиной,
поднимая до небес,
начинается старинный,
церемонный, страстный, длинный
новогодний полонез.

Чинно двигаются лица,
взгляды томные даря,

Blankaj tukoj – vivopaĝoj,
forflugantaj vivopaĝoj
de la jar' pasinta mia –

Disreviĝoj kaj ĉagrenoj,
trompoj, perdoj, fuŝoj, faloj,
miskondutoj, miskomprenoj,
adiaŭoj kaj revenoj –
estingiĝas malrealaj

en etendo de la danco,
en majesta noktomezo.
Nova Jaro, nova ŝanco,
festa paŝo, kora pranco –
multpromesa polonezo!

2004

* * *

Malantaŭ nia stulta am'
dek jarojn rememoroj lulas,
momentojn ĉarmajn respegulas
subita er' de tiu flam'.
Ĉu retroiron mi postulas?
Ho ne! Sufloras la raci',
ke l' senton inter mi kaj vi
perdita tempo ne stimulas.

Ja, tamen ne la stulta sent' –
la amikec' atendas antaŭ,
do, ni, nejunaj geamantoj,
retrovas nin en vivtorent'.
La benon de l' iamaj kantoj,
la sonojn de l' senzorga ĝoj';
kaj ĉiun en la disa voj'
varmigas revoj pilgrimantaj.

Ĉe la hazarda rendevu'
ni ambaŭ ekridetu svage,
ni ion trovu enimage
feliĉan, inter urba bru'.
Kaj la farata ĉiutage

и платочки – как страницы,
облетевшие страницы
моего календаря.

Здесь потери, огорченья
каждодневной суеты,
ссоры, промахи, мученья,
расставанья, возвращенья, –
всё неважно, если ты,

отойдя от декаданса,
в новогодний час чудес
ищешь в этой неге танца
признаки иного шанса.
Да поможет полонез!

2011

* * *

Любовники преклонных лет
все больше к тихой дружбе склонны.
Мы, обходя любви законы,
находим утешенья свет
в беспечной радости почти,
в словах – осмысленных, но нежных,
в благословенье песен прежних,
что согревают нас в пути.

Там нашу глупую любовь
качает бриз воспоминаний
и поцелуев, и стенаний…
И – хоть злословь, хоть прекословь –
а в те далекие года,
как нам подсказывает разум,
вернуться можно только к стразам,
но к бриллиантам – никогда.

Я вам при встрече улыбнусь,
вы улыбнетесь мне при встрече.
Я на приветствие отвечу,
к губам губами потянусь, –
и повседневное теченье

kutima fluo de labor’
por la moment’ degelos for;
proksimon ni ĝuetos vage.

Jes, tamen, kial mi pri l’ sent’?
Neniam amo estis stulta.
Malobeema, jes. Tumulta.
Tenera. Fora de l’ konsent’.
Kaj tamen am’ – ne ŝerc’ adulta!
Sekvante spurojn de l’ pasi’,
indulgon vian petas mi,
ĝenanta ĉe la spir’ singulta.

1998

давно наскучивших забот
отступит вдруг. И вновь придет
всё то же глупое влеченье –

пусть развлеченье, нет – леченье
для незаживших старых ран,
и разум – радостный тиран –
поймет иное назначенье
всех добрых, старых, глупых слов,
как встарь, ничуть не напряженных.
Ведь в них, и в нас, завороженных,
живет, играючи, любовь.

2010

Nu, ĝis...

Sen sun’
nur morn’,
nur dorn’
post dorn’.
Nur vort’
en mis’...
Ne sort’ –
do, ĝis!

Ĝis, mia kara, ĝis!
Ĝis eksopiro, ĝis!
Ĝis rekompreno,
ĝis la reveno,
ĝis la revido...
Nu, ĝis...

Jam en
pasint’
promes’ –
absint’,
kaj kies
kulp’ –
ne gra...
Nur stult’.

Ĝis, mia kara, ĝis!

Пока…

Мы вдруг
слепы,
вокруг
шипы.
Тропа
узка…
Прощай,
Пока!

Будь, милая, пока
Не мучает тоска,
До знака, слова,
До встречи снова,
До возвращенья –
Пока!

Забудь,
остынь…
Горчит
Полынь.
Вины
пятак –
Уж вышло
Так.

Будь, милая, пока!

Ĝis rekonscio, ĝis!
Ĝis la ekpento,
ĝis nia sento,
ĝis nia revo!
Nu, ĝis...

Ĉu dolĉ',
vinber'
por ni liber'
en for',
en dis',
sen kun',
sen kis'?

Ĝis, mia kara, ĝis!
Ĝis la revido, ĝis!
Ĝis finatendo,
ĝis la retento,
ĝis la reamo...
Nu, ĝis!

Sopir',
enu'
nun por
ni du,
kun plor'
kun streĉ'
forbrul'
de meĉ'.

Ĝis, mia kara, ĝis!
Ĝis la finveo, ĝis!
Ĝis la regajo,
ĝis hela majo,
ĝis la aŭroro!
Nu, ĝis...

Kaj ĝis
konsent' –
ĉu tag',
ĉu cent...

Ведь годы, как века
без страсти яда,
без ласки взгляда,
без нас с тобою…
Пока!

Так вот,
как мед –
искать свобод.
На край
земли,
мосты
сожгли…

Будь, милая, пока!
Не встретимся, пока!
Ждать нам не плача,
Ждать, чувства пряча,
Ждать, чтоб дождаться…
Пока!

Что ж плач
не стих
для нас
двоих
Дымок
несмел –
фитиль
сгорел.

Не вдруг
пройдет
сто дней
иль год.
За мглой
Тех лет:
– Постой!
– Привет!

Будь, милая, пока!
Власть чувства далека!

Ĝis ni
en mut',
ĝis kri':
– Salut'!

Ĝis, mia kara, ĝis!
Ĝis la reamo, ĝis!
Ĝis kor' al koro,
ĝis korp' al korpo,
ĝis fajr' al fajro...
Nu, ĝis!

2001

Чтоб страсть созрела,
Чтоб к телу тело.
Чтоб пламя в пламя…
Пока!

2006

«EN FORGESITA LOK' EN SINO DE RUSIO…»

Omaĝe al la 75-a mortodato de K. Balmont

La 23-an de decembro 2017 estis 75-a mortodato de la granda rusa poeto Konstantin Balmont. En REGo № 3 (100) estis publikigita mia negranda artikolo pri la poeto omaĝe al lia 150-jara naskiĝdato kaj pluraj tradukoj de liaj poemoj. Tiam mi emfazis la simbolismon de Balmont kaj notis, ke lia poezio impresas ne tiom per la senco, kiom per sia ĉarma muzikeco.

Nun mi deziras konstati, ke la lasta aserto ne estas vera. Tia transformiĝo de mia percepto de la poezio de la poeto okazis post la antaŭnelonga vizito al la naskiĝloko de Konstantin Balmont – vilaĝeto Gumniŝĉi (en la antaŭa publikigo ĝi estis erare nomita Gumniŝĉe) apud la urbo Ŝuja de la Ivanova provinco, kie li pasigis siajn infanajn jarojn, kaj al la lokoj, ligitaj kun la poeto en Ŝuja. Tiun viziton faris fine de septembro 2017 kvar esperantistoj: krom mi ĝin partoprenis Svetlana Smetanina, Miĥail Ĉertilov kaj lia lernanto, komencanta esperantisto Artjom, kiu helpis al Mikaelo stiri la aŭton (ni veturis per ĝi el Moskvo kaj reen). Celo de nia vojaĝo estis inspekti la lokon de la probabla RET-2018 apud Ŝuja (nun jam estas akceptita decido de la Estraro de REU pri okazigo de la aranĝo ĝuste en tiu loko). Certe ni ne povis ne viziti ankaŭ la memorlokojn de K. Balmont. Tiu vizito estis plensukcesa dank' al ties anticipa organizo far Svetlana Smetanina (Ŝuja estas interalie ŝia naskiĝurbo), kiu interkonsentis pri ĉiĉeronado kun la ekskursgvidanto de la loka literatura muzeo «Konstantin Balmont» Svetlana Vinokurova.

La ekskurso estis brila. Svetlana Vinokurova dediĉis al ni kelkajn horojn. Ŝi ne

nur en la muzeo detale rakontis al ni pri Balmont kun observo de ĉiuj eksponaĵoj, sed ankaŭ akompanis nin en la aŭtovojaĝo en Ŝuja kaj Gumniŝĉi al la Balmont-lokoj: du aŭtentaj loĝdomoj de la Balmont-familio kaj gimnazio, en kiu lernis Konstantin. Ni vizitis ankaŭ la tombejon apud Gumniŝĉi, kie restis memortabuloj sur la tomboj de la gepatroj kaj la frato de la poeto. Bedaŭrinde nenio restis de la biendomo de Balmontoj. Ni promenis en la malnova parko de la eksa bieno, kiu nun ankaŭ ne estas prizorgata, ĝuis la ĉarman naturon de tiu ĉi tre rusieca loko. Ĝuste la naturo estas la plej aŭtenta memoraĵo pri la poeto: ŝajne ĝi tute ne ŝanĝiĝis post li: la samaj riveretoj kaj lagetoj kun spegule glataj kaj trankvilaj surfacoj kaj kun bordoj, dense kovritaj de kareksoj kaj kanoj; samaj herbejoj, ĉirkaŭitaj de betulaj kaj tremolaj arbaroj. Estis suna aŭtuna tago, agrable tepida, kaj nia humoro estis same kvieta. En la memoro aperadis verslinioj de Balmont kaj pri «aromo de suno», kaj pri «senparolo trankvila», kaj pri «forgesita lok' en sino de Rusio»… Apud la tombejo ni renkontis veran sakristianon – tre eksterordinaran personon, kiu kvazaŭ venis al ni el la samtitola versaĵo de Balmont.

Gumniŝĉi nuntempe

Ĝuste post vizito de la Balmont-lokoj mi relegis la poemojn de Balmont kun alia percepto: mi ekvidis en lia poezio ne simbolismon, sed tute realan, tre kompreneblan kaj proksiman al la koro de la rusa homo, la plej teneran kaj profundan amon al la hejmlando, kiun la poeto portis tra la tuta vivo kaj kun kies nomo li mortis en la fremda lando. Lia pasia revo reveni al la patrujo almenaŭ por morti ĉi tie, ve, ne realiĝis. Kaj mi, legante liajn lastajn, plenajn de nostalgia doloro versaĵojn, ĉiam pretas ekplori.

Ludmila Novikova (Moskvo)

POEMOJ DE KONSTANTIN BALMONT
EN TRADUKOJ DE LUDMILA NOVIKOVA (2017)

Аромат солнца

Запах солнца? Что за вздор!
Нет, не вздор.
В солнце звуки и мечты,
Ароматы и цветы
Все слились в согласный хор,
Все сплелись в один узор.

Солнце пахнет травами,
Свежими купавами,
Пробужденною весной,
И смолистою сосной.

Нежно-светлоткаными,
Ландышами пьяными,
Что победно расцвели
В остром запахе земли.

Солнце светит звонами,
Листьями зелеными,
Дышит вешним пеньем птиц,
Дышит смехом юных лиц.

Так и молви всем слепцам:
Будет вам!
Не узреть вам райских врат,
Есть у солнца аромат,
Сладко внятный только нам,
Зримый птицам и цветам!

1899

Aromo de la suno

Sun-aromo? Jen malver’!
Ne malver’.
En la suno rev’ kaj son’,
Kaj aromoj, kaj florkron’
Unuiĝis en koher’,
En ornama belmister’.

Sun’ aromas per sunflor’,
En la sun’ – troli-odor’,
Vekiĝinta primaver’
Kun parfum’ de lonicer’,

Suno – hela karnaval’
Kun tintiloj de konval’,
Ekflorintaj kun triumf’
Sur la spicodora hum’.

Suno lumas per sonor’,
Sonas per folia ĥor’,
Blovas per kantad’ de bird’,
Blovas per juneca rid’.

Do, al ul’ kun misa vid’
Diru: “Ĉit!
Vi – ne imagiva hom’,
Ĉar ekzistas sunarom’,
Kiun flaras nia kor’,
Ĉiu bird’ kaj ĉiu flor’!”

Служитель

В селе заброшенном во глубине России
Люблю я увидать поблекшего дьячка.
Завялый стебель он. На пламени цветка
Навеялась зола. Но есть лучи живые.

Sakristiano

En forgesita lok’ en sino de Rusio
Kortuŝas min oldec’ de la sakristian’.
Li estas velka tig’. La floron de sa-
fran’
Surkovris cindro jam. Sed restas

Когда дрожащий звон напевы вестовые
Шлёт всем желающим прийти издалека,
В золе седеющей – мельканье огонька,
И в духе будничном – воскресность литургии.

Чтец неразборчивый, вникая в письмена,
Нетвёрдым голосом блуждает он по чащам.
Как трогателен он в борении спешащем.

Бог слышит. Бог поймёт. Здесь пышность не нужна.
И голос старческий исполнен юной силой,
Упорный свет лия в зов: «Господи, помилуй!»

1917

viva strio.

Kiam sonoro vibra de alvokmagio
Por pilgrimantoj foraj sonas en aer',
En cindra grizo ekscintilas jen fajrer',
Kaj en humor' kutima – fest' de liturgio.

Psalmoleganto de malnova literar',
Per voĉ' nefirma li vagadas en ĝangalo.
Kortuŝas li en tiu ĉi legad-batalo.

Komprenas Di'. Ne bezonatas pompa klar'.
Voc' olda plenas jam de juna energio
En lumoplenaj vortoj: «Nin indulgu, Dio!»

Кольца

Ты спишь в земле, любимый мой отец,
Ты спишь, моя родная, непробудно.
И как без вас мне часто в жизни трудно,
Хоть много знаю близких мне сердец.

Я в мире с вами. Через вас певец.
Мне ваша правда светит изумрудно.
Однажды духом слившись обоюдно,
Вы уронили звонкий дождь колец.

Они горят. В них золото – оправа.
Они поют. И из страны в страну
Иду, вещая солнце и весну.

Но для чего без вас мне эта слава?
Я у реки. Когда же переправа?
И я с любовью кольца вам верну.

1917

Ringoj

Vi dormas, kara patro, en tersin',
Vi dormas, panjo, ve, sen vekiĝivo.
Sen vi malgajas ofte mia vivo,
Se eĉ parenca kor' konsolas min.

Per vi mi vivas. Mi pro vi – poet'.
Al mi smeralde lumas via vero.
Spiritoj viaj foje en kohero
Ekbrilis per sonora ringoplekt'.

Radias ĝi per la beata oro.
Duetas ĝi. El tiu eŭfoni'
Naskiĝas mia suna simfoni'.

Sen vi ne bezonatas mia gloro!
Mi ĉe river'. En aliborda foro
Kun am' redonos viajn ringojn mi.

Я русский

Я русский, я русый, я рыжий.
Под солнцем рождён и возрос.
Не ночью. Не веришь? Гляди же
В волну золотистых волос.

Я русский, я рыжий, я русый.
От моря до моря ходил.
Низал я янтарные бусы,
Я звенья ковал для кадил.

Я рыжий, я русый, я русский.
Я знаю и мудрость, и бред.
Иду я – тропинкою узкой,
Приду – как широкий рассвет.

1921

Mi – ruso

Mi – rusa, mi – rura, mi – rufa,
Naskiĝis sub sun’ – ne sub lun’.
Atestas, ke l’ diro ne blufa,
La ond’ de l’ harara orlum ’.

Mi – rusa, mi – rufa, mi – rura.
Mi vagis tra l’ maroj de l’ mond’,
Farante fumilon aĵuran,
Sukcenan bidaron sur bord’.

Mi – rufa, mi – rura, mi – ruso.
Min regas sagac’ kaj delir’.
Mi iras – per streta vojkurso,
Mi venos – vastsuna sor-ir’.

Хочу

Хочу густого духа
Сосны, берёз и елей.
Хочу, чтоб пели глухо
Взвывания метелей.
Пастух пространств небесных,
О ветер далей русских,
Как здесь устал я в тесных
Чертах запашек узких.
Давно душа устала
Не видеть, как цветками
Дрема владеет ало
Безмерными лугами.
Пойти по косогору,
Рекою многоводной
Молиться водам, бору,
Земле, ни с чем не сходной.
Узнай все страны в мире,
Измерь пути морские,
Но нет вольней и шире,

Mi aspiras

Aspiras mi odoron
De pinoj kaj betuloj.
Aspiras mi ĝemĥoron
De neĝventegaj huloj.
Paŝtist’ de l’ ĉielsfero,
Ho vent’ de rusaj geloj,
Min premas sur ĉi tero
Streteco de l’ parceloj.
Laciĝis la animo
Ne vidi kiel floroj
En la herbej-senlimo
Skarlatas en langvoro.
Mi vagu ĉe l’ rivero
En la humor’ lirika,
Mi preĝu al la tero
Plej kara, plej unika.
En ajna monda lando
Mezuru ĝin per io:
Ne estas pli senranda,

Но нет нежней – России.
Все славы мне – погудки.
В них душно мне и вязко.
Родные незабудки –
Единственная сказка.
Ребячьи мне игрушки –
Красоты, что не наши.
Напев родной кукушки –
Вино бездонной чаши.
Уютной, ветхой няни
Поёт жужжанье прялки.
Цветут в лесном тумане
Ночные нам фиалки.
От севера до юга,
С востока до заката –
Икона пашни, луга,
Церковность аромата.
Пасхальной ночи верба –
Раскрывшаяся тайна,
Восстанье из ущерба
Для жизни, что бескрайна.
Лишь тот, кто знал морозы
И вьюжное круженье,
Войдёт в такие грозы,
Где громы – откровенье.
Лишь нами – нами – нами
Постигнуто в пустыне,
Как петь колоколами
От века и доныне.
Кто жаждет благолепий,
В чьём сердце звучны хоры,
Тому – от Бога – степи,
Ему – леса и горы.
Хочу моей долины
И волей сердца знаю,
Что путь мой соколиный –
К Единственному Краю.

1928

Pli milda ol Rusio.
La glor’ por mi – hipnoto,
La strangolil’ anhela.
Hejmlanda miozoto –
Jen sola ĝoj’ fabela.
Por mi ludilo drola –
De fremdaj landoj belo.
Hejmlanda plor’ kukola –
Jen vin’ de plenbarelo.
Zumadas ŝpina rado
De l’ vartistino mola.
Vastiĝas dum florado
Aromo noktviola.
Al sudo de la nordo,
Al suna sob’ de l’soro –
Ikon’ de l’ rura mondo,
Diserva fumodoro.
La salikbranĉa plekto
De l’ nokto Pask-spirita –
Postmorta resurekto
Al vivo infinita.
Spertinta rusan froston,
Blizardon kaj glacion
Komprenos fulmotondron –
Por si revelacion.
Nur ni – nur ni – nur ni ja
Kapablas kiel magoj
Por kantoj sonorilaj
De l’ prao ĝis nuntagoj.
Strebanta al majesto,
En kies kor’ ĥoraloj,
Ekhavas de l’ Mondestro
Arbarojn kun montvaloj.
La valon mi aspiras
Kaj scias sen demando,
Ke mia vojo iras
Al la Unika Lando.

Stepan Pisaĥov naskiĝis la 25-an de oktobro 1879 kaj travivis 80 jarojn en Arĥangelsk. Li studis pentroarton en Peterburgo, poste dum du jaroj vojaĝis tra la mondo. Poste li vojaĝis nur en la norda regiono, kiun li bone konis kaj tre ŝatis. Li estis verkisto, fabelisto, etnografo, pentristo kaj instruis pentroarton en mezlernejo. En Arĥangelsk li estis rimarkebla kaj fama persono. Kiam li ion rakontis en sia neripetebla popola maniero, neniu povis ĉesi aŭskulti lin. En plimulto da fabeloj rakonto prezentiĝas en la nomo de Senja Malina, loĝanto de apudurba vilaĝo Ujma. Kiel pentristo Pisaĥov ĉiam strebis laŭeble pli reale respeguli la mondon, sed en la fabeloj li liberigas sian riĉegan fantazion, ĝis plena trompo. Pisaĥov mem nomis sin "norda Münchhausen" kaj ripetadis: se ne plaĉas al vi – ne aŭskultu, sed mensogi al mi ne malhelpu!

Stepan Pisaĥov

SE NE PLAĈAS – NE AŬSKULTU

Pri nia Arĥangelska lando tiom da malveroj kaj kalumnioj oni rakontas, ke decidis mi diri ĉion, kio ĉe ni estas, la tutan realan veron. Kion ajn dirus mi – ĉio estas vero. Samlandanoj ja apudas kaj ne permesos al mi mensogi. Nu, ekzemple, rivero nia Dvina en streta loko larĝas tridek kvin verstojn, sed en la plej vasta – pli ol la maro. Oni navigadis laŭ ĝi sur eternaj glacipecoj. Ni havas eĉ glaciistojn. Estas tiuj homoj, kiuj vivtenas sin per glacia afero. Ili alflosigas glacipecojn de la maro kaj ludonas ilin al dezirantoj.

Ŝparemaj oldaj mastrinoj trahakas truojn en eternaj glacipecegoj. Tiom da jaroj konserviĝas la glacitruo!

Printempe, por ke la glacipeco kun truo ne degelu vane, oni ĝin en glacikelon entrenas – por malvarmigi bieron kaj kvason. En praa tempo al fraŭlinoj unuavice oni donis dote eternan glacipecon, kaj poste – vulpan felpalton, por ke ili havu sur kio kaj en kio gastveturi trans la riveron.

Somere al ni multaj homoj alveturas. Jen ili venas al glaciisto kaj komencas marĉandi, por ke li donu al ili glacipecon pli bonan, sed prenu nur po tri kopekojn de unu persono. Tamen eĉ la tramveturo tiam kostis dek kvin kopekojn!

Nu, la glaciisto kvazaŭ ne kontraŭas, ŝajnigas konsenton. Li alŝovas kaŝe feblan glacipecon – malnovan, aspran, apenaŭ vivan (kvankam la glacipecoj eternaj estas, ankaŭ ili la finon havas).

La alveturintoj deflankiĝas de la bordo je deko da verstoj, jen, kiel konvenas, kanton ekigas. Niaj buboj jam atendas – puŝas ilin per pli forta glacipeco, kaj la malnova tuj komencas rompiĝi. Gastoj jelpas: "Oj, ni dronas! Oj, savu nin!".

Nu, la buboj tuj ĉirkaŭas ilin sur siaj glacipecoj: "Po unu rublon de ĉiu muzelo, se ne – jen la urso alnaĝas, ankaŭ rosmarojn ni instigos!"

Kaj ursoj blankaj kun rosmaroj estas kvazaŭ salajrataj – scias sian aferon! Jam alnaĝas. La alveturintoj pro timo pagas po unu rublon. Ne plu marĉandu!

Kaj jen ni mem je bona kompanio luas glacipecon. Unuavice ni esploras per stango, kiomjara ĝi estas: se pli ol centjara – ni ne prenas, se malpli – do estas juna kaj taŭga por la afero. Ĉe ni eĉ olduloj ĝis centjara aĝo paŝas kiel pavoj.

Do eksidas ni sur la glacipecon, hisas la velon por rapideco kaj malfermas ombrelojn, por ke la suno ne tro bruligu. Ĉe ni somere la suno ne subiras: ĝi enuas stari sur la sama loko, tial rondiras laŭ ĉielo. Dum diurno kvindek rondojn ĝi faras, kaj se la vetero bonas, do eĉ sepdek. Sed se estas pluvo kaj malsekeco – tiam la suno ripozas, senmovas.

Kaj sur la kontraŭa bordo plena beato, plena ĝuo. Grandaj kamemoroj kreskas, la beroj po tri funtoj kaj pli, ankaŭ ĉiuspecaj aliaj beroj.

Salmoj kaj moruoj mem kaptiĝas, mem sentripiĝas, mem saliĝas, mem en barelojn pakiĝas. La fiŝistoj nur alrulas malplenajn barelojn al la bordo kaj poste la fundojn alnajlas. Kaj pli viglaj fiŝoj, kiam sentripiĝas, en la kukon mem envolviĝas. Salmoj kaj hipoglosoj plej lerte el ĉiuj fiŝoj en la kukon envolviĝas. La mastrinoj nur ŝmiras la kukojn per butero kaj metas ilin en la fornon.

Blankaj ursoj vendas lakton – instruitaj estas. Blankaj ursidoj kolportas heliantsemojn kaj cigaredojn. Diversaj birdetoj ĉirpas – arktaj strigoj, mevoj, molanasoj, kolimboj, anseroj, cignoj, nordaj agloj, pingvenoj.

Pingvenoj, kvankam ĉe ni ne loĝas, venadas perlabori, paŝas kun gurdoj kaj tamburinoj. Iuj vestiĝas kiel simioj, prezentas diversajn artifikojn. Kvankam ne taŭgas por ili vestiĝi simie – la gamboj kurtas – nu, ni ne kapricas, por ni ne gravas, ke ne aŭtentas la simioj, estu almenaŭ ridinde.

Kaj dum grandaj festoj foje pingvenoj kun blankaj ursoj komencas rondodanci, eĉ ekas kaŭrante danci, nu, ĝis ridego! Kaj rosmaroj kun fokoj apud bordo en akvo plaŭdas kaj murmuras – la muzikon faras siamaniere.

Jen buboj kaptas balenon aŭ du, alligas ilin ĉe bordo kaj devigas por malvarmigo de aero eligi akvon fontane. Sed brunajn ursojn oni strikte ne enlasas. Ĉie en loĝataj lokoj staras fostoj kun surskriboj: “Por brunaj ursoj eniro malpermesita”.

Foje iu viro veturigis farunon en sako. Estis tio en la supro de Norda Dvino, pli supre ol la rivero Ljavlja. La sako falis de sur la ĉaro kaj perdiĝis en arbaro. Bruna urso trovis la sakon, plene rulkovriĝis per faruno kaj iĝis kvazaŭ la blanka. Li ŝtelis boaton kaj alnavigis en la urbon. Lin portis la rivera fluo kaj vento, li nur la rudron turnadis. Atingis li bazaron kaj eksidis sur glacipecon. Li decidis por komenco vendi heliantsemojn kaj kvason, kaj kiam li riĉiĝos iom – ankaŭ hejman brandon. Sed oni lin rekonis – ĉu eblas ne rekoni? La aspekto ja perfidis. Kiom da rido estis! Oni lin banis en la akvo. Malsekegas li, ronkas – kaj buboj lin kun ridego kaj kantoj ekster la urbon forpelis.

La urso ekploris pro la ofendo. Niaj homoj tamen estas bonkoraj – donis al li faskon da anizaj kringoj, duonpudon da sukero, kaj invitis dum festoj veni por manĝi terpomajn kukojn.

la antaŭparolo kaj la traduko de Larisa Ŝapoŝnikova (Arĥangeljsk)

KANTO KUN INTERESA HISTORIO

Aleksandr Gorodnickij verkis tiun ĉi kanton en 1970. En 1987 estis eldonita libro, en kiu li priskribas, kiel li faris tion kaj kio okazis poste. Ni prezentas por la legantoj la originalon kaj du E-tradukojn de tiu ĉi kanto. Fine vi trovos ankaŭ rilatan pecon el la rememor-libro.

Жена французского посла

Музыка и слова Александра Городницкого

А мне не Тани снятся и не Гали,
Не поля родные, не леса, –
В Сенегале, братцы, в Сенегале
Я такие видел чудеса!
Ох, не слабы, братцы, ох, не слабы
Плеск волны, мерцание весла,
Крокодилы, пальмы, баобабы
И жена французского посла.

Хоть французский я не понимаю
И она по-русски – ни фига,
Но как высока грудь её нагая,
Как нага высокая нога!
Не нужны теперь другие бабы –
Всю мне душу Африка свела:
Крокодилы, пальмы, баобабы
И жена французского посла.

Дорогие братья и сестрицы,
Что такое сделалось со мной?
Всё мне сон один и тот же снится,
Широкоэкранный и цветной.
И в жару, и в стужу, и в ненастье
Всё сжигает он меня дотла, –
В нём постель, распахнутая настежь,
И жена французского посла!

1970

L' edzin' de l' francambasador'

(tradukis Mikaelo Povorin, 2017)

Rusaj inoj – jam ne idealo,
La natur' patruja – bagatel'.

Mi en fora lando Senegalo
Vidis inon de mirakla bel'!
Ho! Mojosas briloj de remiloj,
Plaŭdaj ondoj, de la mar' odor',
Baobaboj, palmoj, krokodiloj
Kaj l' edzin' de l' francambasador'!

Mi la francan tute ne komprenas,
Kaj ŝi ruse – du-tri vortojn nur.
Tamen ŝiaj mamoj amorplenas,
Sveltas nudaj kruro kaj femur'.
Senutilas nun da inoj miloj –
Pro Afrik' ondege batas kor':
Baobaboj, palmoj, krokodiloj
Kaj l' edzin' de l' francambasador'!

Geamikoj, la vizi' ne cedas.
Kion faru mi, samidean'?
Min konstante bunta sonĝ' obsedas,
Kvazaŭ en kinejo sur ekran'.
Varmo, pluvo, vento, vintra frido –
Tiu sonĝo min bruligas for:
Pretas min brakumi luksa lito
Kaj l' edzin' de l' francambasador'!

Impresoj de sovetia specialisto, reveninta el la fora lando Senegalo
(tradukis Sergej Bronov, 1979)

Ne plu Tanjojn sonĝas, ne plu Galojn,
De l' patruj' ne venas plu miraĝ':
En la fora lando Senegalo
La alia estis mirindaĵ'.
Ne impresas ĉu la suno brila
Kaj blueco de la mara for'?
Baobaboj, palmoj, krokodiloj
Kaj edzin' de l' francambasador'.

Mi la francan ne parolas tute,
Ŝi la rusan same ne "mur-mur",
Sed ho kiel krutas mam' akuta,
Kiel nudas ŝia nuda krur'.

Ne necesas damoj plu similaj,
Per Afrik' nur vivas mia kor'...
Baobaboj, palmoj, krokodiloj
Kaj edzin' de l' francambasador'.

Geamikoj karaj kaj gefratoj,
Kial do estiĝis tia pun'?
Multkolora kaj la grandformata
Sama sonĝ' nur vizitadas nun.
Kaj en frost', kaj en varmego ŝvita
Saman filmon montras la memor':
En la kadro lito malkovrita
Kaj edzin' de l' francambasador'!

<...>

La sekvan tagon sur la ŝipon venis la sovetia ambasadoro en Senegalo, de kiu ni eksciis, ke la tria tago de nia restado en Dakaro koincidos kun nacia festo de la respubliko – la Tago de Sendependeco. Omaĝe al ĝi devas okazi parado de militŝipoj kaj sporta festado, inkludanta pirogan vetremadon kaj aliajn konkursojn.

En la tago de la festo la ŝipestro ordonis surakvigi ŝipan motorboategon, sur kiun inter la elektitoj, estante amiko de Belousov, trafis ankaŭ mi. Hisinte la ruĝan ŝtatan flagon, la boatego kuraĝe direktiĝis en la centron de la haveno, kie okazis parado de la militŝiparo de la respubliko Senegalo. La ŝiparo konsistis el kelkaj malnovaj dragŝipoj, eleksplu atigitaj en Francio, kaj unu destrojero. Omaĝe al la festo okazis demonstra descendo de paraŝutistoj sur la akvon. La nigraj paraŝutistoj vigle elsaltadis el du grandaj transportaviadiloj, senhaste flugantaj preter la bordo. Falinte sur la akvon, ili lerte malfermadis siajn pneŭmatajn flosetojn kaj atendis la boategon, kiu enprenis ilin. Du paraŝutistoj, verŝajne erarinte pri la trajektorioj, anstataŭ la maro estis ventoportataj direkte al la tero, kaj la ĉefa administranto mansvingis: ĉi tiujn eblas ne enpreni. Ĝuste tiumomente mi rimarkis la edzinon de la franca ambasadoro.

Ŝi staris sur la centra podio proksime al la prezidento de Senegalo Léopold Sédar Senghor, apud sia edzo – Eksterordinara kaj Plenrajta Ambasadoro de Francio en Senegalo. Mi vidis ŝin tra la lorno, kiun al mi donis la ŝipestro. Ĉio, kion mi sukcesis distingi, estis blanka robo kaj larĝa blanka ĉapelo, malantaŭ kiu flirtis maldika gaza skarpo. Se temas pri nia ambasadoro, starinta sur la sama podio: li, ekvidinte, ke ni eniĝis preskaŭ en la vicon de la senegalaj militŝipoj, sufiĉe imprese minacis al ni per pugno. Kuŝante surventre, mi pene elakvigis la malgrandan boategan ankron, kaj ni iris hejmen. La humoro tamen estis festa, kaj vespere de la sama tago, eltrinkinte kun Igorj Belousov kaj aliaj kolegoj botelon da adstringa

maldiafane ruĝa senegala vino, mi, je mia malfeliĉo, elpensis petolan kanton pri la edzino de la franca ambasadoro, kies serena bildo dum kelka tempo ŝvebis en mia ebria imago. Malagrablaĵoj pro tiu kanto komenciĝis ne tuj, sed proksimume post jaro, tamen daŭris dum multaj jaroj.

<...>

La sekvan jaron post la apero de la missorta kanto "Pri la edzino de la franca ambasadoro" min vokis al si la tiama sekretario de la partia buroo, interalie tre fama kaj meritoplena sciencisto pri solidaj minaĵoj de la oceano, profesoro kaj doktoro de sciencoj, grizhara kaj bela nealta kaŭkazano kun agla nazo kaj densaj brovoj, per sia aspekto similanta grafon Kaliostro. Kiam mi venis al li en la ĉambron de la partia buroo, kie li estis sola, li ŝlosis la ĉambron, ial anticipe elrigardinte en la koridoron.

– Ni interparolos kiel viroj, – anoncis li al mi. – Ĉi tie ĉe mi kuŝas por subskribo via karakterizaĵo por la marveturo. Do, diru al mi sincere: kion vi havis kun ŝi?

Mirigita kaj maltrankviligita per tiu neatendita demando, mi penadis kompreni, pri kiu konkrete temas.

– Ja ne, vi pensas pri alio, – la sekretario faciligis mian turmentan pensadon pri la antaŭnelonga pasinto, – mi vin konkrete demandas.

– Pri kiu? – demandis mi timete.

– Kial "Pri kiu?"? Pri la edzino de la franca ambasadoro.

Mi trankviliĝinte suspiris, kvankam, kiel evidentiĝis, ĝoji estis tro frue.

– Kion vi diras, Boris Ĥristoforoviĉ! – kontraŭdiris mi ridetande. – Kion do povas havi simpla sovetiano kun la edzino de burĝa ambasadoro?

– Ne provu trompaĉi min, – severe interrompis min la sekretario, – kaj politikan abocon al mi ne instruu: mi mem povas instrui ĝin al kiu ajn. Diru al mi sincere: ĉu jes aŭ ne?

– Pro kio do vi pensas, ke mi kun ŝi havis ion? – indignis mi.

– Kial "Pro kio?"? Se nenio estis, kial vi verkis tian kanton?

– Ja nenial, nur por ŝerco, – naive provis klarigi mi.

– Nu, ne! Ŝerce oni tiaĵon ne verkas. Tie estas vortoj, evidente skribitaj laŭ propraj impresoj. Do, ne mensogu al mi kaj konfesu. Kaj konsideru: se vi honeste rakontos pri ĉio, krom mi neniu ekscios tion, kaj la karakterizaĵon mi subskribos, mi donas al vi honorpromeson. Ĉar el via konfeso sekvos, ke vi plene senarmiĝis antaŭ ni, kaj al vi denove eblas fidi.

– Antaŭ kiu do – antaŭ vi? – ne komprenis mi.

– Kial "Antaŭ kiu?"? Ja antaŭ la partio!

Nun mi komprenis, ke li parolas tute serioze, kaj ege maltrankviliĝis.

Dum la sekva duonhoro li, ne ŝparante fortojn, klopodis ajnrimede eligi el mi konfeson pri voluptaj agoj kun la edzino de la franca ambasadoro. Mi regis min kun stoikeco de kondamnito. Mia kunparolanto elturmentis min kaj ege elturmen-

tiĝis mem. Lia frunto malsekiĝis. Li demetis la jakon kaj pendigis ĝin sur la dorsapogilon de sia sekretaria seĝo.

– Nu, bone, – diris li. – Finfine, estas ankaŭ alia aspekto de la demando. Mi ja estas ne nur partia sekretario, sed ankaŭ viro. Al mi simple estas interese scii: ĉu estas vero, ke ĉe la francaj virinoj ĉio okazas ne kiel ĉe la niaj, sed dekoble pli bone? Ne dubu do, mi al neniu ion diros!

Mi malgaje insistis pri la samo.

– Aŭskultu, – perdinte la paciencon, ekkriis li, – mi ja estas ne nur viro: mi estas kaŭkazano. Kaj kaŭkazano estas viro kun signo de alta kvalito, ĉu vi komprenas? Mi ja tutsimple profesie nepre bezonas scii: ĉu vere en Francio ĉiuj virinoj estas ne kiel niaj taburetoj, nu?

Mi obstine silentis.

– Do jen kiel! – furioziĝis li. – Iru for de ĉi tie! Mi nenion subskribos por vi!

Mi afliktite eliris el la partia buroo kaj ektreniĝis laŭ la koridoro. Fine de la koridoro li subite kuratingis min, kliniĝis al mia orelo kaj flustris:

– Bravulo! Ankaŭ mi ne konfesus!

Kaj li subskribis la karakterizaĵon.

tradukis Mikaelo Povorin (Moskvo)
(dankema al ĉiuj samideanoj, kiuj helpis pri la traduko)

KLARA ILUTOVIĈ

KARMEMORE PRI MIKAELO GIŜPLING

Simplaj vortoj por pensoj profundaj.
La invok' de l' sagaco kaj ver'.
Ĉirkaŭmondaj vivbildoj abundaj
En la lingvo de l' pac' kaj esper'.

Liaj versoj purige impresaj
Lumas je la legemsugesti'.
Lia vers', lia vort' korkonfesaj
Stele brilas por Esperanti'.

Liaj versoj legantojn plu regos.
Morto estas ne ĉiam la fin',
Kaj esperantistar' ĉie legos
Liajn versojn, aŭdante plu lin.

Kantas voĉ' de la lingva pasio
En espero, meditoj kaj trist'.
Grandan dankon pro la poezio,
Donacita de l' Esperantist'!

Esperanto vivemas kaj vivas
Tra obstakloj kaj prem' de l' rutin'.
Sonos laŭte la nomo de Giŝpling –
Esperanto memoros lin.

2017

ANTAŬ LA NOVJARO

Hundo estas animal' fidinda,
Kaj defendas ĝi abnegacie.
Homo neplenkreska aŭ eĉ blinda
Pri la hund' esperi povas ĉie.

Tamen ĉu defendi povas hundo
La venontan jaron, tutan jaron,
Kies tempokur' kaj zorginundo
Povas meti nevenkeblan baron?

Jarordigo hundon ne koncernas,
Ĝi ne povas gvidi kaj inspiri.
Al la Hom' ekjaro vojojn sternas
Por elekti ilin kaj pluiri.

Dum la jaro pri la vivo ĝoju,
Pri la vivo – malgraŭ ĉio – bela!
Hundo boju, nova jaro voju –
Estu ĝia vojo ĉiam hela!

SEPTEMBRO POST ANOMALIA SOMERO

Septembr'. Ekaŭtun' kalendara.
Foriris tro kurta somero.
Ĉu estos l' aŭtun' malavara
Pri varm' en la lasta tenero,

Sen pluvoj kaj morna ĉielo,
Sen batoj de anomalioj
Por ĝoj' de promen' sen ombrelo
Dum kantoj de buntaj folioj?

Somer' venis nur en aŭgusto –
La temp' adiaŭe minora...
Jubilu vetere nun justo
De l' posta aŭtun' vere ora!
Korektu l' aŭtuno erarojn
De la nesomera somero,
Donacu l' vigligajn bonfarojn,
Veninte, aŭtuna vetero!

PATRINO DE TERORISTO

Ĉiu teroristo
Havas la patrinon,
Kiu lin edukis
Por la paca bon'.
Kiu al ekzisto
Lia metis finon
Kaj promesojn trukis
Por la fiadmon'?

La patrin' dediĉis
Sin por vivjubilo
De la fil' en hela
Lia perspektiv'.
Kio l' filo iĝis –
La amata filo,
Ŝia lum' fidela
Kaj pravig' de l' viv'?

Ĉu l' animmutilon
Ŝi plu povas porti
En vivinda horo
Sub vivama sun'?
Scias ŝi la filon
Per mortigo morti –

Kaj ĉu ŝia koro
Ne vekrias nun?

Ŝi ne kulpas vere
Pri misvoj' de l' filo,
Ĝin ŝi ne sugestos,
Edukante lin.
Tamen senespere
Ŝia kulpigilo
Malfeliĉe restos
Li ĝis ŝia fin'.

OMAĜE AL INTERNACIA TAGO DE LA MUZIKO

Lirle karesemas melodio.
En akordoj gaje bruas fest'.
Jen eklumas kante sunradio.
Jen proksimas voĉoj de tempest'.

Sonas am' kaj falo, ĝoj' kaj timo.
Grandas forto de la sonalsend'.
Kial malaperas la deprimo?
Kial estingiĝas la ofend'?

Plivastigas la ĉirkaŭan mondon
La muziko por la aŭskultant'
Kaj sugestas por la bel' respondon
Klaran kaj facilan al demand'.

Kantas oceano de l' muziko,
Kuras ĝiaj ondoj al la hom'
Por la sonmistera komuniko,
Por la plisaniga vivarom'.

Fluas tondre-milde sontorentoj,
Kiel esperigo de amik'.
Belo ne de sonoj, sed de sentoj
Estas mirindaĵo de l' muzik'.

OMAĜE AL LA 25-JARIĜO DE “IMPETO”

Esperantio brulas
Je steloj de l’ ideo.
“Impeto”, ni gratulas
Vin pri la jubileo!

Medi’ l’ samideana
Inspiru fortodone.
“Impeto” estu sana
Kaj fartu ĉiam bone!

Edonoj ne mizeru
En faloj kaj amaro.
“Impeto” plu prosperu
Por esperantistaro!

Neniu sentu mankon
Sur Esperanto-pado.
“Impeto”, grandan dankon
Pro via laborado!

Firmigu plu l’ sugeston
Por Esperanto-kreo.
“Impeto”, bonan feston
De via jubileo!

OMAĜE AL LA 130-JARIĜO DE ESPERANTO

Tra malordeg’ la socia
Fluas la hela river’ –
Lingvo la internacia,
Lingvo de l’ bona esper’.

Sen fierem’ de l’ prestiĝo
Dum l’ anglalingva pluprem’
Ĝia centtridekjariĝo
Kantas pri ĝia vivem’.

Cent tridek jaroj traflugis
En krizoj, venkoj kaj pac’.

Esperantistoj priplugis
La lingvoterojn sen lac'.

Nure-nur cent tridek jaroj –
De ĉiu lingvo junec'.
Vojoj, triumfoj, amaroj
Gvidas ĝin al la aprec'.

Trovu amikon amiko
En Esperanto-medi',
Kaj Esperanto-muziko
Logu je l' ĝojmelodi'!

Ravu je lumo de kreo
Ĉiu bongusta esprim',
Kaj en la lingvjubileo
Festu la verda anim'!

Bolas la vivo kaj brulas.
Jar', kiel tag', flugas for.
Ni Esperanton gratulas –
Brilu por ĝi l' sortfavor'!

***

Ven' de l' anoncego
Dekomence ŝokis.
Do, adiaŭ, REGo –
L' temp' alien vokis.

Ĝia verda tero
Plijuniĝon sendis.
Ĉiam kun espero
Oni ĝin atendis.

Por la lingvekzisto
Sonis ĝi muzike.
Ĉe esperantisto
Restis ĝi amike.

Ĝi ebligis teni
Ravon de vivsukoj
Eĉ sen partopreni
En tendaroj-UKoj.

Bele, kore, saĝe
Ĉiam ĝi impresis.
Estos tre domaĝe,
Ke ĝi vivi ĉesis.

Pro multjare pena
Via laborego
Je l' sindono plena
Grandan dankon, REGo!

***

Proksimiĝas la Nova jaro –
Nova ĝojo de l' granda fest'.
Malaperu sen spur' amaro,
Vaste fluu l' fortunsugest'!

Je perleroj neĝar' scintilu,
Stelridetu ĉiela for',
La ekjar' je la grac' jubilu
Ĉiuhejme, en ĉiu kor'!

Je l' dekdua eksonu kanto
Pri feliĉo, juneco, ĝoj'!
Se ĝi sonos en Esperanto,
Estos hela l' dumjara voj'.

Al la hejm' kaj anim' favore
Ondu pace la vivomar'!
Mi deziras al vi plej kore
Ĉion bonan de l' Nova jar'!

“GRIZA KAPRETO”[1]

serio de parodioj pri infana popola kanteto
laŭstile de famaj rusaj poetoj

Verkis tre antaŭlonge Tatjana Auderskaja (Ukrainio)

Kvazaŭ ruĝa fadeno trairas la mondan literaturon korŝira historio pri la griza kapreto.

Traduko de la originalo:

Vivis ĉe olda dam’ griza kapreto,
Du-tri, du-tri, griza kapreto.

Amis treege lin kara avino,
Du-tri, du-tri, bona avino.

Foje forkuris li al la arbaro,
Du-tri, du-tri, nigra arbaro.

Tie formanĝis lin griza luparo,
Du-tri, du-tri, kruela luparo.

Kaj restis por la avin’ hufoj kaj kornoj,
Jen do, jen do, hufoj kaj kornoj.

Lia tragika sorto dum longaj jaroj elvokis la inspiron de multaj eminentaj aŭtoroj.

Jen kiel rakontus la saman historion rusa ekstravaganca poeto-modernisto ***Igorj Severjanin****:*

Oldulin’-sorĉistino
Pro la ama inklino
Flirtis en reva sento kiel kordo en vent’.
Kapro juna kaj griza
Kun ĉarmeco pariza
Ludis skercon amoran por animo en tent’.

Sur herbejo aĵura
Ortagmezo purpura.

---

[1] La verko antaŭe estis publikigita en 2011 en “Mirmekobo”

Tiel lace-langvore gapas li al arbar'...
Kiel bone sen vorto
Sin fordoni al sorto
Kaj atendi surprizon en silento, sen far'.

Ho, adori la lupon,
El si fari la supon
Por plenigi la beston per ekstaza pasi'.
Kaj al sorĉistulino
Kun sinistra inklino
Imponege donaci ŝikan kornon de si!

Kaj jen tute alia poeto, la tenera kaj langvora
***Aleksandr Vertinskij**:*

Kien foriris vi, ho griza, ho kapreto,
Kun sonoril' sur kol', rubando sur la korn'?
Sopiras la ĝarden', kaj ploras virineto
Pro la mortinta am', kaj pro venonta morn'.

En lasta trista hor' mi vidis vin proksime,
Al nigr-arbar' vi strebis en la kabriolet',
Kaj poste falis vi sub lupa pez' senlime,
Lasinte kornojn nur al povra virinet'.

Jen la kruda kaj morne ironia
***Saŝa Ĉornij**:*

Ŝiris harojn pro griza kapraĉ' oldulino...
(Ploru, ploru, formanĝu vin lupoj!).
Ŝi lamentis pro sia severa destino
Kaj karesis (tjfu!) kornajn hufojn.

Kial preterrigardis vi, kap' sen cerbo?
Ja forkuris via trezoro.
Kaj kuŝas en arbaro sur herbo
Ostoj de kapro, kiu kredis je boneco de lupa moro.

Amegis, fordonis la lastan paneron,
Sed lupoj – ne kokinoj!
Ili lasis al avino sur sanga tero
Nur hufojn kaj kornojn. Jen fino.

Kaj nun – tri poetoj de la mezo de la 20-a jarcento.

Jen la ĉiam aktuala ***Jevgenij Jevtuŝenko****:*

Jen kio en la viv' okazis:
La kapro griza min forlasis,
Sed vizitadas min en van'
La vulpo rufa, verda ran'...

La kapro mia kun aliuj
Vagadas en arbar', ne tiuj
Kiujn bezonas li en kor'.
Ni ambaŭ ploras en la ĥor'.

La lupo per brakum' tenera
Lin logis al arbar' danĝera,
Kaj mi en malespera sent'
Brakumas triste kun serpent'...

Jen restis hufoj nur kaj kornoj
De mia am' en tagoj mornaj.
Ho IU, venu por alvok',
Min savu de l' fremdul' minaca
Kaj kun anim' de l' kapro paca
Min ligu en beata lok'.

Jen la profundsenta
Andrej Voznesenskij*:*

En aŭroro mi vekos la kapron,
Li foriros al nigra arbaro,
Kaj sopire mi klinos la kapon, –
Dio nin ne kunigis en paro.

Mi senŝua al sojlo foriros
Lastrigardi al griza, kornhava.
"Bonan vojon" al li mi deziros,
Kvankam ĉeas jam son' de malsavo.

Du ĉerizoj enlarme dronitaj –
Kuŝas kornoj kaj hufoj sur herbo.
Mi sur ter' vin revidos neniam,
Sed pri vi ne forgesos la cerbo!

Kaj jen la patosa
***Robert Roĵdestvenskij**:*

Tio estis. Forgesis – kiam.
Nure gravas, ke okazis.
Kapron oni forŝtelis mian
Dum mi propran vizaĝon razis.

Mi animon disŝiris floke,
Mi ne kredas al mens' klara:
Al densej' de l' arbar' loka
Forlogita kapret' kara.

Griza lupo, muzel' turpa,
Lin devoris kun ĝu' mava.
Jen ĉi tiel okazis murdo,
Ĉar forestis la man' sava.

Pendas Lun' kiel lupa dento,
En horor' mi entiras kapon.
Ĉu en la trideka jarcento
Lupoj ankaŭ mortigos kaprojn?!

EN LA ANTAŬA, TIU ĈI KAJ SEKVA PAĜOJ ESTAS KELKAJ FOTOJ EL DIVERSAJ JAROJ

☺ AMUZAJ MISSKRIBOJ KAJ ERAROJ ☺

Jen estas kelkaj amuzaj eraroj kaj misskriboj, trovitaj dum legado de diversaj E-tekstoj, plejparte – en la tekstoj, senditaj por REGo:

80-ariĝanta *(anst. 80-jariĝanta)*
multaj surkolaj geesperantistoj *(anst. surlokaj)*
pastoprenis *(anst. partoprenis)*
Varia Rajevskaja *(anst. Maria)*
Saltumesaĝo *(anst. Salutmesaĝo)*

Estimataj gesamideanoj!

Vi tenas en la manoj lastan numeron de la gazeto. Kiel vi jam scias, REGo ne plu aperados.

Mi esperas, ke laboro de REGo-teamo dum la pasintaj 17 jaroj ne estis vana kaj la gazeto almenaŭ iom utilis por (ĉefe) rusiaj geesperantistoj.

Mi dankas Viktoron Aroloviĉ, Maksimon Griŝin kaj ĉiujn aliajn gesamideanojn, kiuj dum tiuj jaroj kontribuis al la gazeto, pro multjara kunlaboro, kiu ebligis eldonon de pli ol cent numeroj de REGo.

Mi dankas ankaŭ ĉiujn legantojn, kies subteno ĉiam senteblis kaj helpis.

La ĉefa danko – al nia kara lingvo Esperanto, kies ekzisto tiom multe kaj bone influis al la mia (espereble – ankaŭ al la via) vivo!

ĉiam via Georgij/Garik Kokolija